

# SENNACIECA

Organo de SENNACIECA ASOCIO  
TUTMONDA, kultura kaj interhelpa  
organizo de prolet-esperantistoj

# REVUO

APERAS  
MONATE

REDAKTEJO, ADMINISTREJO: 23, rue Boyer, Paris 20<sup>e</sup>.

APERAS  
MONATE

Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris : Bruxelles n-o 358 189, S'Gravenhage n-o 211 533, Kopenhago n-o 4 986, Leipzig n-o 85 148. Paris n-o 1234 22, Stokholmo n-o 74 153, Wien n-o D-109 068, Zagreb n-o 41 448, Zürich n-o VIII-200 49, Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT, bonvalutaj devizoj en rekom letero aŭ bankĉeko je nomo de « L. Bannier ».

## ABUNDO AŬ MALABUNDO

*El diversaj vidpunktoj oni povas rilati al la problemo pri naskolimigo k naskokontrolo. Unu el tiuj vidpunktoj estas ĉi tiu prezentita en la sekvanta artikolo, kies aŭtoro konkludas je malsufiĉo da vivrimedoj por densa loĝantaro. La problemo cetere ankaŭ estas traktita en la « Malgranda Terbiblio » de SAT<sup>1</sup>. Ni pensas, ke la artikolo trovas la intereson de ĉiuj legantoj. — Red.*

« Ni havas tro da ĉio ». Tiu aserto ne estas nova, sed neniam ĝi estas pruvita. Elize Reclu (Reclus) provis, antaŭ kvindek jaroj, ĝin pravigi de la kampokultura vidpunkto, en broŝuro pri « La produktoj de la Tero ». Li ne sukcesis. Li supersatigis homojn, atribuante al ili la tutan rikolto-produkton de la greno, la viandon de ĉiuj dombestoj, ne enkalkulante la nepre necesajn rezervojn.

Laŭ sugesto de Paŭlo Robin, kiu tre dubis pri l'abundo, mi provis, dum 1904, kompari la nombron de la loĝantoj kun la kvanto da vivrimedoj, tiom, kiom ebligis la statistiko. Ne estas eble sciigi ĉi tie, laŭ kia metodo mi laboris. Sufiĉas nur diri, ke, komparante porcinojn, necesan al homo, kun porcio fakte liverata al ĝi de la kampokulturo, mi trovis, ke la lasta estis malpli alta ol la unua, ke la mondo suferis pro nesufiĉo. Mi eĉ kuraĝis precizigi, ke la homaro apenaŭ rikoltis du trionojn el tio, kio estis necesa al ĝi.

Neniu ajn diskutis miajn ciferojn per aliaj aŭ sukcese atakis mian konkludon. Dum 1905, Ives Gijo (Guyot) restudis la problemon el tutmonda vidpunkto. Per preskaŭ similaj metodoj, li konfirmis la opinion, kiun mi esprimis « La tritik- k viandproduktado en la mondo, li diris, estas multe pli malalta ol la necesa porcio ; multaj el tiuj, kiuj bezonas rebonigan nutradon, havas nur nesufiĉan nutradon... ktp ».

Dum 1908, per parolado pri la « Kampokultura produktivo k sociaj problemoj » k dum 1909 per sia libro « Tritiko k greno » s-ro Danielo Zolla, kultursciencisto, profesoro en Grinjon (Grignon) energie

neis la kredon, tiel malnovan, tiel firme fiksitajn en la menso, tiel popularan, pri la abundo de kampokultura produktado en Francio k en la mondo. S-ro Paŭlo Lerua Bolje (Leroy Beaulieu) aprobis la dirojn de s-ro Danielo Zolla. Estas neniam diskutitaj nek la certajtoj, nek la konkludoj, de mi k de tiuj ekonomiistoj, kiuj, kvankam « burĝoj » havis la meriton kontraŭmeti ciferojn kontraŭ malprecizaj kredoj.

Sekve, se iliaj verkoj estas konsiderindaj, ni ne havis tro da nutraĵoj antaŭ la milito. Ĉu la mondo k Francio havas troe post la milito ?

Kiel ĉiam, oni citos la progreson. Oni diros, ke, precipe de post 1914, novaj grundoj estas ekkulturitaj en la mondo, ke la terekspluataj rimedoj perfektigis k. c. Kaj nenio estas pli vera. Sed, spite la nova amplekso de la produktado, mi persistas ĉe la pensado, ke la situacio tre malmulte ŝanĝiĝis, aŭ neniel ŝanĝiĝis, eĉ ke ĝi eble pligraviĝis, tamen konsiderante, ke efektiviĝis pli ol iam la antaŭmalhelpaj k punforigaj baroj al la plimultnombriĝo de la loĝantaro.

Ni komparu, ekzemple, la produktadon de la du ĉefaj kulturoj, tritiko k terpomoj, en la civilizitaj landoj, dum la du jardekoj 1901-10 k 1921-30. La unua estas precize tiu, dum kiu la antaŭcititaj ekonomiistoj konstatis la nesufiĉon de la rikolto-produktoj.

La landoj de intensa produktado liveris, je miloj da milkilogramoj, la sekvantajn meznombrajn jarproduktojn<sup>2</sup>

### Tritiko.

	1901-10	1921-30
Eŭropo	51.500	52.500
Usono	18.000	22.500
Kanado ..	3.000	11.000
Argenti io	3.500	6.000
Aŭstralio	1.500	4.000
<b>Sume</b>	<b>77.500</b>	<b>96.000</b>

<sup>2</sup> Tiuj ciferoj estas kalkulitaj laŭ tiuj de la statistika jarlibro de Francio (1931) k de la statistika jarlibro de la Ligo de Nacioj (1930-31).

<sup>1</sup> Prezo 6 fr. fr. (sur luksa papero, kun kartoskizoj).



Alegorio de la hispana artisto SUM, dediĉita al la Internacia Koopera Movado kun ĝiaj justaj principoj pri la distribuado de l'mondproduktoj.

	Terpomoj.	
Eŭropo	121.700	116.000
Usono	8.000	10.500
Kanado . . . . .	1.200	2.300
Argenti io	1.100	800
Aŭstralio	300	400
Sume	132.300	130.000

Estas plialtiĝo ĉe la tritiko, malplialtiĝo ĉe la terpomoj.

Sed, dum tiuj jardekoj, la loĝantaro de tiuj nuraj landoj (kiuj, krom Eŭropo, estas eksportantoj) kreskis de 530.000.000 ĝis 630.000.000 da loĝantoj. La jara produktado po loĝanto, estas, je kilogramoj

	1901-10	1921-30
Terpomoj	249	206
Tritiko . . .	146	153

Produktado po loĝanto, ne manĝkonsumo. Ĉi lasta povas nur esti kalkulata post fortranĉoj de la kvantoj necesaj por la semo, por la dombestoj, por la industriaj uzadoj, ktp.

Ĉu la plialtiĝo je proksimume unu dudekono ĉe la tritiko pravigas la aserton, ke ekzistas abundo? Post medito, mi ne kredas tro riska la konkludon, kiel dum 1904, ke ne sufiĉas la nutrado devenanta el la kampokultura produktado en la civilizitaj landoj, ke ekzistas konstanta manko ĉe la azianoj, universala bezono naskanta mizeron, ekonomiajn konfliktojn, doganan konkurencon, militojn, revoluciojn, ktp.

La mondo ne havas tro da ĉio. Kaj Francio? Jen du tabeloj kalkulitaj laŭ la samaj fontoj, kiuj elmontras por Francio la produktadon, je miloj da milkilogramoj, da greno (tritiko, sekalo, aveno, hordeo, maizo) k terpomoj, k la produktadon po loĝanto, dum la samaj jardekoj

*Tuta produktado (miloj da milkilogramoj).*

	greno	terpomoj
1871-80	14.700	8.800
1881-90	15.800	10.500
1891-00	16.000	12.400
1901-10	16.400	12.800
1911-20	13.000	10.800
1921-30	14.700	13.100

*Po-loĝanta produktado (kilogramoj).*

	greno	terpomoj
1871-80	400	228
1881-90	400	276
1891-00	410	346
1901-10	418	326
1911-20	330	275
1921-30	366	327

La grenproduktado po loĝanto estas malpli alta dum 1921-30 ol dum 1871-1910, k la terpom-produktado dum 1921-30 estas malpli alta aŭ egala al tiu dum 1891-1910. Mi nur montras ĉi tie la komparrimedojn, ne serĉante la efektivan parton. Por eltrovi la eblan pologantan manĝkonsumon en Francio, estas fortranĉendaj la necesaj kvantoj el tiuj jam cititaj por la tuta mondo.

Sekve, se estas ĝusta la opinio de s-ro Zolla, ke: « la plej rigora distribuegalo ne povus doni al ĉiuj francoj komforton, senĝenecon, sufiĉhaston ktp »; mi ne komprenas, kie estas nuntempe la nutradabundo!

Sed, oni diros, dum 1932, la rikoltprodukto de l'tritiko, en Francio, estis mirinda! Verdire, ni ankoraŭ ne konas la definitivajn nombrojn. Oni taksis ĝin plejalte ĉirkaŭ dek milionoj da milkilogramoj. Por malplialta loĝantaro, la rikoltprodukto preskaŭ atin-

gis tiun kvanton dum 1894, 1895, 1898, 1899, 1903, 1909. Dum 1907, ĝi preterpasis ĝin. Ĉu ni havis tro da tritiko dum tiuj jaroj?

Ni ne havas tro da nutrado. Ni havas sufiĉe da nenio.

Se oni farus serĉesplorojn — kion parenteze, mi sugestas al la lertkleruloj de la Ligo de Nacioj — serĉesplorojn rilatajn al la sufiĉo da vestaĵoj, da loĝejoj, da korp-kintelektkulturo, da scienca, literatura, k artisma distro, ktp, unuvorte de ĝenerala komforto, individua k komuneca, privata k publika, mi estas konvinkita, ke estus konstatebla la absoluta maleblo plene provizi la unuajn materiajn necesojn, eĉ moderajn, de ĉiu homo, k ke, funde, la homaro estas bezonhava k avara.

Tio ne malhelpas, ke varoj estas nevendataj, malŝparataj, k eble — sed laŭ mia opinio oni troigas — bruligataj, en la maron forĵetataj. Konfuzo inter la komercista ekonomio k la socihoma ekonomio.

Por la unua, la nepagataj k nekontentigitaj bezonoj estas malinteresaj. Nur valoras la monkvanto, granda aŭ malgranda, kiun entenas negoco, k iĝas plejofte parta, kelkfoje tuta, bezonkontentigo. El tiu komercista ekonomio devenas ĉiuj fuŝaĵoj, spekulaciaj trompaĵoj, la privilegioj de politika klientaro, la dogana procedo. Sed tio ne signifas, ke ekzistas abundo. Kaj S-ro Jakobo Dubuen (Duboin), ironie proponante la senpagan disdonon de nevenditaj produktaĵoj, tuj elmontras, ke ili ne sufiĉas k ke ili estus senprokraste finĉerpitaj de konsumantoj, nesufiĉe nutritaj, vestataj, loĝigataj, ktp., kies aĉetpovo estas, ĉu tro malalta, ĉu neekzistanta.

Rilate al la socihoma ekonomio, kiu estas nia, k por kiu ĉefas komforto en ĉiuj sencoj, de ĉiuj infanoj, de ĉiuj plenaĝuloj, k ne nur komforto, sed ankaŭ superfluo, kio, iafoje, estas pli bezonata ol la neceso, rilate al tiu socihoma ekonomio, mi estas el tiuj, kiuj pensas, ke Sovetio multe penis por ĝin efektiviĝi.

Tamen, postrestas la fakto, ke, laŭ Marks, k forlasante Malthus, Sovetio ankoraŭ ne povis, post dek kvin jaroj, akirigi al sia loĝantaro sufiĉhavecon, kiun la revolucianoj pensis povi efektiviĝi post la renverso de la carisma reĝimo, malgraŭ la antaŭrimedoj kontraŭ tronombrigo de la naskoj (*naskokontrolo*). Ne sufiĉas la kvinjarplanoj de produktado. *Necesus tujaj planoj de naskdeflacio, de malplinombro de la loĝantaro, de stabiligado de la loĝantnombro* laŭ la nivelo, konsentita kiel nesufiĉa, de la produktkapablo. La soveta popolo atendas laŭvice sur la strato, sub ĉiuspeca vetero, porcion eĉ ne mezkvalitan k ofte duban.

Se oni adoptus la « plej rigoran porciegalon », la porciigo, la kune dividata mizero fariĝus la sorto de ĉiuj homoj tiom longe, kiom la socireformantoj rifuzos enmeti ĉe la unua rango de sia programo, kia ĝi estu, anarkista, faŝista, komunista, ktp, la temon pri la nasklimigo, la maltusianismo k neomaltusianismo pri loĝantnombro.

Kelkaj bonaj amikoj skribis al mi, ke ili ne opinias same kiel mi. Ne ekzistas nur grenoj k terpomoj. Kompreneble. Sed nenio pruvas, ke vi havu sufiĉe da viando, da legomoj, da fruktoj, da fromaĝo ktp. Ĉu mi povas doni ĉi tie ĉiujn detalojn? Tio pli ol plenigus la revuon.

Viando ? Oni povas sufiĉe facile doni ideon pri la porcio, kiu povas esti asignata al ĉiu plenaĝulo rilate la jardekojn, pritraktitajn en mia artikolo. Mi diris, ke la loĝantnombro kreskis de 530 milionoj ĝis 630 milionoj. Ni malplialtigu, je unu kvarono, tiun nombron, kiu entenas infanojn, virinojn, maljunulojn, por ĝin kvazaŭigi al la nombro da plenaĝuloj. Por tion fari, la matematikisto Lagranĵ (Lagrange) nur malplialtigis je unu kvinono la tutan loĝantnombron. Sekve, proksimume 400 milionoj da loĝantoj por la jardeko 1901-1910, k 475 milionoj por la jardeko 1921-1930.

Jen, do, la nombro da brutoj breditaj en la suprenomitaj landoj (po milionoj)

	1901-1910	1921-1930
Gebovoj	243	277
geŝafoj .....	400	385
geporkoj	127	153

Supozante, ke, meznombro, ĉiuj tiuj brutoj pezus la mezpezon de la raso, kiuj liveras plej da viando, ĉi lasta atingos, ĉe la gebovoj, 225 kilogramojn, ĉe la geŝafoj 22 kg., k ĉe la geporkoj 50 kg. Do konsekvence, po miloj da tonejoj

	1901-1910	1921-1930
Bovajo.....	54.700	69.250
ŝafajo.....	8.800	8.470
porkajo	6.350	7.650

Sed tiuj kvantoj ne estas haveblaj ĉiujare. Laŭ la « Aide-mémoire de l'Ingénieur agronome » (memorlibro de l'kampara inĝeniero), de Vermorel, oni buĉas nur, proksimume, la kvinonon da kornbrutoj, la kvaronon da ŝafoj, la duonon da porkoj. Ni havas do ĉiujare la sekvantajn haveblajn viandkvantojn (po miloj da tonejoj)

	1901-1910	1921-1930
Bovajo.....	10.940	13.850
ŝafajo.....	2.200	2.100
porkajo	3.185	3.825
	<u>16.325</u>	<u>19.775</u>

Kaj ni ricevas, kiel porciojn por ĉiu plenaĝulo, jenajn nombrojn :

	Jara porcio po kilogramoj	Taga porci po gramoj
1901-1910	40.8	115
1921-1930	41	115

La laŭregula porcio de la franca soldato estas 300 gramoj da senosta kruda viando ĉiutage. Kaj la suprediritaj 115 gramoj entenas ostojn k forĵetaĵojn !

Ĉu abundo do ? Kaj ne estas enkalkulitaj la landoj, kiuj, pro sia malplivasta bredado kaŭzas malplialtigon de la jam malgranda porcio asignebla al ĉiu civilizita homo. Kaj fiŝoj, kunikloj, kortbirdoj, ĉasbestoj, oni diros same ? Kunigitaj, ĉiuj tiuj nutroj ne plialtigus la viandporcion je unu dekonon.

Ni ne havas tro da ĉio.

Gabrielo Hardi (Hardy).

El la « Granda Reformo » esperantigis Erbaro.

## La Faŝismo estas necesa Historiprocezo

Letero el Brazilio.

En grandega preskaŭ-kontinento kiel Brazilio, kun maldensa loĝantaro, la sociaj fenomenoj ne devus simili tiujn de l'malnova mondo dense surloĝata ; ĉar restas grandegaj teritorioj ankoraŭ nesemataj, k devus manki ĉiam laboristoj. Tio estas la nepra konkludo, al kiu venas la burĝaj sociologoj, konsiderante, ke en Brazilio estas sufiĉe da libera lando, por ke ĉiu enloĝanto estu bienposedanto. Teorie kalkulante en la kabineto, tio estas vera, tamen en praktika vivo la afero estas tute alia : La lando estas regata de kapitalista reĝimo, same kiel la malnovaj kontinentoj, k nur monhavanto povas akiri teron apud fervojo aŭ haveno. La dezertaj partoj de la lando, kie ne estas transportrimedoj, estas neloĝeblaj. La urbaj industrioj, regataj de la kapitalo, uzas procedojn iom similajn al tiuj de l'malnovaj landoj, k tie la loĝantaro densiĝas, okazigante ĉiujn kapitalistajn fenomenojn inkluzive la senlaborecon kun ĝia sekvantaro el mizero, sklavigo, prostituo, ktp.

Inter Brazilio k aliaj landoj, tamen, ekzistas granda reala diferenco, kiu estas jena : La plej granda parto el la landa loĝantaro vivadas mizere en la kamparo, kiel bienlaboristoj, eterne pagantaj terrenton al la terposedantoj. Tia terrento estas pagata ne per mono — ĉar monon ili ja neniam havas — sed per kafo, maizo, fazeolo, rizo, k.s. La terposedanto postulas por si duonon de la kafo rikoltita k unu trionon de la cerealoj, kiel lupagon de la tero. Leĝa kontrakto tute ne estas. Nur buŝe la du partoj interkonsentas, k — rimarkinde estas, ke la terposedanto nur tre malofte eksigas la laboriston antaŭ la rikolto — tia parola kontrakto daŭras eĉ dum multaj jaroj. Tiu grandega parto de la loĝantaro formas la solan veran ekonomiforton de la lando, sed ilia propra vivkondiĉo estas la plej mizera, ĉar ili ne posedas organizon por sin defendi, nek sufiĉan instruon por kompreni siajn proprajn rajtojn. Simplaj animoj, ili tre facile partiĝas favore al siaj ekspluatantoj en la loka politiko k konsistigas politikanforton precize kontraŭan al siaj propraj interesoj.

Tre facile, do, la bienposedantoj k politikaj estroj aranĝas armeojn por defendi siajn politikajn pretenojn. Tute nekompreneble la maljuston de ili mem toleratan, ĉar ili ne povas imagi al si alian sociordon, tiu kampara loĝantaro estas en Brazilio la plej grava baro al iu ajn socialisma progreso.

La bienposedantoj estas samtempe politikaj gvidantoj. La senkultura kamparloĝantaro estas tradicie romkatolika. La Romkatolika Eklezio estas historia, potenca organizo, ĉiam senkondiĉe apoganta la regantajn politikajn estrojn. Klaskonscio tute ne ekzistas ĉe la loĝantaro : ekspluatatoj k ekspluatantoj akceptas la situacion kiel tre naturan.

Eĉ en urboj braziliaj klaskonscio ne estas klara kiel en Eŭropo. Laboristoj emas aspekti kiel burĝoj, k multaj burĝoj devenas el la laboristaj medioj. Laboristaj politik-partioj tute ne ekzistas, aŭ — kiam ili ekzistas surpapere — neniam sukcesigas balote siajn kandidatojn. La burĝaro ankaŭ ne havis verajn politikajn partiojn ĝis nun. Nur ekzistis ŝtataj gvidantoj kun nomoj de ŝtataj partioj, t.e. *Partido Republicano Mineiro* (Respublikana Partio de Minas), *Partido Republicano Paulista* (Sankta-Paŭla Respublikana Partio), *Partido Republicano Riograndense*

### Al via speciala atento

ni rekomendas la prospekton kun Eldonplano de A. D. L. E. L., kiu estas aldonita al ĉi tiu numero ! Ne metu ĝin malatente flanken, sed pripensu serioze la avantaĝojn, kiujn donas al vi tiu ĉi Plano. Per aliĝo al A. D. L. E. L. vi metas vere fundamentan ŝtonon por bela esperantlingva biblioteko !

(Respublikana Partio de l'Ŝtato Rio Grande do Sul) ktp, por ĉiuj 21 ŝtatoj de la Brazila respubliko.

Tiuj P.R. (oni nomas ilin P.R. mallongige por *Partido Republicano*) stariĝis antaŭ preskaŭ 50 jaroj, kiam Brazilio estis imperio, kun la celo propagandi la respublikajn ideojn, k ili konserviĝis ĝis nun. De partioj ili ja havis nur la nomon.

Nun, post la burĝa revolucio de 1930, iom post iom stariĝas partioj, sed neniuj laborista. Ĉiuj estas burĝaj. Ni fondis socialistan partion, nome, « Demokrat-socialista partio », sed ĝi estas ankoraŭ tre malforta k ne sukcesis balote venkigi eĉ unu kandidaton al la nuna konstitucia parlamento. Ni posedas neniun socialistan aŭ laboristan gazeton.

Malgraŭ tiu absoluta neekzisto de socialista aŭ laborista movado en la lando, la burĝaro organizas nun kun entuziasmo Faŝistan Partion, uzante eĉ la italan nomon « *fascista* ». En sia manifesto ili ja ne parolas pri komunistoj aŭ socialistoj, sed uzas aprombajn vortojn « La granda de l'Patrujo, Unuigita Brazilio, k.s. ».

Tia strangaĵo tamen kreskas, sentaŭguloj aliĝas, sensecaj paroladegoj aŭdiĝas...

*Ismael Gomes Braga (2201).*

## El Argentino

Argentino ne estas maltrafita de la tutmonda krizo, k la ekonomia situacio ne pliboniĝis en la lasta jaro; male. La unua alarmpafo lastdata estis la publikigo de l'*eksport-nombroj* pri la unuaj kvin monatoj de 1933. Ili montris, ke kompare kun la jaro 1932 okazis *regreso je 26 %*. Kaj, kompreneble, jam la antaŭjaraj nombroj multe malsuperis la normon. Jenaj ekzaktaj nombroj

	En	paperaj pesoj <sup>1</sup>
Eksporto en la unuaj 5 monatoj	1929	1.034 milionoj
	1930	683
	1932	650
	1933	478

Ĝis fino de aprilo la *importo* montris regreson de *proks. 14 %* kompare kun la antaŭjaro (pli freŝdatajn nombrojn mi ankoraŭ ne konas).

La eksporta regreso estis atendebla, ĉar la nunjara rikolto, precipe maiza, estis malpli granda ol la antaŭjara. Krome aldoniĝas plia prezredukto. Rilate la viand-eksporton ludas rolon la Otava-kontraktoj, kiuj koncernas la anglan merkaton, la ĉefan disvendejon por Argentino. Tial Argentino klopodis reatingi pli bonan traktadon fare de Anglio, kiucele estis tien sendata la Roka-komisiono. Oni ne scias, ĉu praktika sukceso estos atingita. La import-malpliigon kaŭzas pluraj cirkonstancoj. Unue la ĝenerala malpliigo de l'aĉetopovo (la argentinaj kamparanoj, kiuj pli frue aĉetis multe da aŭtomobiloj k traktoroj, hodiaŭ parte ne plu povas disponi la monon por tiaj aĉetoj k revenas al la uzo de ĉevaloj), plie la malfaciligo de l'importo per la lastaj dogan-altigoj, k krome la deviza kontrolo, kiu same bremsas la importon.

Argentino estas serĉanta merkatojn. La doganmuroj, kiujn starigis ĉiuj eŭropaj landoj, k ankaŭ Usono, kontraŭ la argentinaj produktoj k tiuj el aliaj agraraj landoj, havas nature fatalan efikon por Argentino. La forvendo de l'argentinaj produktoj okazas kutime nur ankoraŭ je malgajnoprezoj. Tial Argentino provas per traktadoj kun la unuopaj ŝtatoj reatingi por si pliboniĝon de tiuj kondiĉoj. La unua lando, kun kiu tiaspecaj traktadoj okazis,

<sup>1</sup> Unu arg. peso valoras 5 ½ fr. frankojn.

estis Ĉilio. Efektiviĝis ia interkonsento, kiu tamen ĝis nun ne donis praktikajn sukcesojn al la du najbaraj landoj, sed estigis konflikton kun Germanio. Ĉi lasta konflikto dume estis forigata per reciprokaj cedoĵoj. Kun Ĉilio estis farata kontrakto kun daŭro unujara. La plej gravaj tiuspecaj traktadoj okazis kun Britio. La vicprezidanto Roka mem veturis Londonon por gvidi la traktojn. Li akceptis multajn personojn, faris paroladojn, aranĝis sennombrajn konferencojn, sed nur penege li fine povis alporti hejmen malgravan rezulton: Britio faris al Argentino kelkajn promesojn rilate la estontan egaltraktadon kiel la proprajn koloniojn aŭ iel simile, kontraŭ kio Argentino devis promesi la liberigon de l'ĉi tie konfiskitaj anglaj devizokreditoj (plej parte dividendoj de ĉi-landaj anglaj entreprenoj). Britio ankaŭ samtempe promesis prunton al Argentino. Sed dume oni ne multon aŭdis pri la praktika realigo de l'kontraktoj, k Britio eĉ ree anoncis malpliialtigon de la viand-importoj.

La delegitaro, kiu estis sendita en Italion por traktoj, ĝis nun laŭŝajne faris nenion alian ol laŭdparoladojn al la faŝismo k partoprenojn en festenoj. Musolini evidente ne pensas pri plialtigo de la gren-importoj. Kun Usono preskaŭ ne ekzistas komercaj rilatoj: Usono ne aĉetas argentinajn kampar-produktojn, k sekve Argentino apenaŭ povas ankoraŭ aĉeti usonajn aŭtomobilojn ktp.

La inflacia movado ekhaltis, post kiam la valoro de l'argentina peso proksimume duoniĝis per la « Patriota Prunto » de l'lasta jaro. La amortizo ankoraŭ okazas, kvankam ĝi kostas grandajn penojn. La moratorio (prokrasto en la ŝuldpagado), de multaj flankoj postulata, ĝis nun ĉiam estas malakceptita; kiel motivon oni nomas la nacian honoron. Ĉu tio estas la sola motivo, aŭ ĉu estas implikitaj aliaj intereso, oni ne povas vidi. Repagoj de pruntoj en la pagdatoj almenaŭ ĝenerale ne okazas, aŭ maksimume per malgrandaj partopagoj. Post la senvalorigo de l'dolaro la celo de l'argentina inflacio, t.e. dumpingo, ankaŭ estas minacita.

Rilate la internajn. financojn same ne ĉio statas bone. La buĝetoplano por 1933 laŭŝajne estis ekvilibra, sed oni povas forte dubi, ĉu la enspezoj ĉiuj efektiviĝos. La impostoj enspeziĝas nur malrapide, pro la krizo, k la ŝparoj en la ekonomia plano restos verŝajne ankaŭ surpaperaj. La malforta punkto, la baza punkto ankaŭ de l'tuta argentina ekonomio, estas la kampokulturo, k en ĉi tiu speciale la latifundioj (grandaj bienoj). Kiel en la tuta mondo, la grandbienuloj ankaŭ en Argentino dronas en ŝuldoj; la hipotekoj estis surmetataj en la jaroj de l'bonstato, surbaze de plej liberalaj taksoj de la grundvaloro. Hodiaŭ tiuj hipotekaj sumoj parte estas pli grandaj ol la valoro de l'tutaj bienoj. Tiel okazas, ke la posedantoj ne plu povas pagi la interezojn. La hipotekoj devenas plejparte de la Nacia Hipoteka Banko, kiu por tio eldonis obligaciojn (« cédula »). Jena situacio rezultas el tio: La hipotekaj ŝuldantoj grandparte prokrastas per la interezopagoj; hipotekoj nuligitaj ne povas esti amortizataj; aŭkciojn kutime la hipoteka banko ne povas riski, ĉar influhavaj personoj malhelpas ilin, aŭ ĉar la enspezo por amortizi la hipotekon ne sufiĉas; la interezoj de l'obligacioj tamen devas esti plupagataj. Tial la situacio de l'hipoteka banko estas la plej malbona. Sed ĝi estas subtenata, pro tio ke la grandaj interezoj de l'influj personoj ludiĝas. Kaj ankaŭ ĉar la hipoteka banko estas la dorsapogo de l'argentinaj publikaj intereso. Se ĝi bankrotus, eĉ la Nacia Banko ne plu eltenus, k



multaj bankoj k privataj entreprenoj ruiniĝis. Certe tio estus vojo al purigo ; sed volonte neniu suriros tiun vojon.

Sub la altaj doganprotektoj kontraŭ importoj evoluas nuntempe en Argentino nacia industrio. Al ĉi tiu treege plaĉas la nuntempaj cirkonstancoj, kiuj baras la eksterlandan konkurencon. La Unuiĝo por nacia industrio jam aranĝis grandajn manifestaciojn. Argentino, la agrara lando sen karbo, ligno, fero nek aliaj metaloj, ĝuste volas fariĝi industria lando !

La senlaboreco daŭras. La fervojistoj ankaŭ spertis salajrajn malpliigojn. Subvencioj ne ekzistas. Kiu ne iel trovas laboreblon, devas aŭ almozpeti (kio rilate nutraĵojn cetere estas sufiĉe facila k profitdona) aŭ iĝi krimulo. La krimoj proporcie pliiĝis. Publika laborhavigo ekzistas nur surpapere. Por vojokonstruo oni ne uzas senlaborulojn.

La ĝenerala politiko restas la sama ; la registaro Justo ŝajnas sufiĉe firma k ĝi scias forigi siajn politikajn kontraŭulojn sub prefekste de imagaj ribelprovoj. La Ĉako-konflikto inter Paragvajo k Bolivio, en kiu Argentino apogas Paragvajon, estas nur flanko problema por Argentino.

Socipolitike oni celas la kreon de nova punleĝaro. Punoj por atencoj kontraŭ la ŝtatpovo en ĝi estu pliakraj. Per tio konturiĝas la tendenco de l'plifortiganta faŝista movado. La senlaboruloj aliflanke, same kiel ĉiuj homoj, kiuj ne adoras la burĝajn idealojn, estas nomataj « komunistoj », kio ĉi tie estas la imageble plej malbona insultaĵo.

La laboristaro bedaŭrinde estas skismigita.

La preznivelo restis proksimume la sama ; kelkaj prezoj eĉ malaltiĝis, ankaŭ tiuj por luo. Nur kelkaj import-varoj prezaltiĝis, precipe aŭtomobiloj. La anglan kapitalon investitan en Argentino oni taksas je 500 milionoj da ft. sterl., la usonan je 800 milionoj da dolaroj.

Reos.

## La senlaboreco en Germanio

Oficialaj germanaj sciigoj fanfarone deklaras pri la sukceso de l'unua ondo de la batalo kontraŭ la senlaboreco « Du milionoj da senlaboruloj estas envicigitaj en la laboro ! ». Sed maljuna laboristo, membro de NSBO (Naci-socialista organizo por la produktado) — mi ne scias ĉu membro libervola aŭ gumbastona —, diris « Estas same kiel en la milito ; la Prusoj venkis k venkis k fine ni estis perdintaj la militon ». Eble la afero nun estas iomete simila ? Certe indas la demando, ĉu la supre menciita sciigo signifas faktan venkon en la batalo kontraŭ la senlaboreco.

Ne estas facile konstati la veran nombron da envicigitaj. La plej fidinda statistiko estas tiu de l'asekurkaskoj kontraŭ malsano pri la nombro da okupitoj. Laŭ la oficiala sciigo pri ĝi estis okupitaj meze de 1933 : 600.000 homoj pli ol en 1932 ; laŭ la detala statistiko estis fine de junio 1933 : 530.000 pli ol je la sama dato en 1932. Sed de tiu ĉi nombro oni dealkulu 180.000 okupitojn per la labor-servo (252.000 kontraŭ 70.000 en 1932), 145.000 junulojn, okupitajn en la tielnomata terkulturhelpo k 66.000 okupitojn en laboroj pro mizerstato (1933 115.000, 1932 : 49.000). Tiel ĝustigante la supran nombron ni ricevas la rezulton, ke ĉ. 250.000 homoj trovis laboron en la labor-merkato pro pliboniĝo de l'konjunkturo (ekonomia cirkonstancaro) aŭ pro ŝtataj rimedoj por havigi laboron. Nun la nombro certe estas pli alta, plej ekstreme mi ĝin taksas nun (komence de oktobro

je 500.000. Sed, konsiderante ke la senlaboreco komence de ĉi tiu jaro estis pli granda ol meze de l'pasinta, kia do estas la sukceso ?

La komercistoj plue plendas, ke la negoca situacio restis malbona k ankaŭ la raportoj pri la diversaj industri-branĉoj estas esperplenaj k kontentigaj nur en tiuj branĉoj, por kiuj estas profitaj la laborhavigaj planoj de l'registararo (industrioj de ferproduktado k entera konstruado) aŭ specialaj kaŭzoj (ekz. la demando pri flagtuko k brunaj ŝtofoj ĝis meze de aŭgusto por la teksindustrio, tiu pri aŭtomobiloj pro malaltigitaj impostoj). Ŝajne nia maljuna laboristo iomete pravus ! Eble la sukceso ne estas tiom profunda, kiel kredigas la unua rigardo. Klare tion montras la statistiko pri la debito de l'detalistoj. Ĝi estis kompare al la pasinta jaro (januaro 1932 = 100).

	laŭ monvaloro	laŭ kvante
aprilo	100	106,8
majo	96,4	101,5
	92,7	97,1

Unua duono de l'jaro 1933 kompare al tiu de 1932 (= 100) nutraĵoj = 93,1 ; ŝuoj = 94,7 ; teksaĵoj = 86,7 ; vitro k porcelanaĵoj = 90,3 ; feraĵoj = 98,2 elcentoj.

La plua evoluo similas al tiuj ĉi nombroj ; sed mi ne posedas detalajn nombrojn. La poŝto raportas, ke ĝia debito ĝis julio restis sub tiu de l'pasinta jaro, ke ĝi en julio estis 111 elcentoj kompare al julio 1932, sed en aŭgusto denove malaltiĝis al 106 elcentoj. Tio facile estas klarigebla per observoj en la komerca vivo en julio okazis ondo da aĉetoj pro timo, ke la ĉie kreitaj k kreaĵoj karteloj plialtigis la prezojn. De tiam la inklino por aĉetoj reduktiĝis.

Stranga afero « Du milionoj envicigitaj » — kiuj grandparte estis senlaboraj jam de jaroj, do havas grandan demandon pri viv-bezonoj — k tamen la detalista debito eĉ ne kreskis laŭ monvaloro, kvankam ĝuste la prezoj por tre gravaj viv-bezonoj, nutraĵoj ktp. estas plialtigitaj. Tre strange ! Sed nur kiam oni ne scias la detalojn. La nombro da labortagoj ne kreskis samgrade kiel la nombro de l'oficialaj envicigitoj. Multaj fabrikoj dungis novajn laboristojn aŭ ne maldungis aliajn, sed ili *mallongigis la labortempon* aŭ laborsemajnon — kompreneble sen kompensa pago. Ĉie oni nun envicigas la tielnomatajn « bonfar »-ricevantojn en iu ajn publika laboro. Tiele kreskas la nombro de l'envicigitoj. Sed ĉu kreskas la aĉetpovo ?

Juĝu : En la grandaj arbaroj proksime de ni tiuj homoj ricevas 10 mk.g. semajne k la vojo al la laborloko, ofte 2-4-hora ĉiutage, ne estas pagata. Ĉe la malfacilaj riparlaboroj de la ŝtata fervojo la laboristoj ricevas 13-15 mk.g. semajne. La konstantigo de l'mizero komenciĝas ! Ankaŭ el fabrikoj oni jam aŭdas pri semajna salajropago de 18 mk.g. aŭ ne pli alta sumo. La gajno de l'homoj, eĉ kiam ili laboras, ne estas pli alta ol la ĝisnuna subvencio ; do ili ne povas aĉeti pli ol antaŭe. Sed la prezoj, kiel jam menciite, grandparte estas plialtigitaj, k ĉefe por la plej necesaj varoj. Ekz. margarino kostas nun 0.80 mk. anstataŭ 0.35 ; la plej mizeraj ricevas ioman kvanton el malkara margarino kontraŭ administracia permesilo. La pano estas same kara kiel antaŭe, la viando plikariĝis, k multaj aliaj varoj. La baznombro por nutraĵoj estas nun 92,1 kontraŭ 80,9 en januaro, tiu por konsumvaroj 113,5 kontraŭ 113 en januaro k 111,6 en marto.

Ni scias, ke la krizo rezultas el disfalo de aĉetpovo k produktokapablo. Komparante la ĉi-suprajn faktojn, ni do povas konkludi, ke ankoraŭ ne estas elbata-

lita vera venko super la krizo. Kaj observante, ke la germana registaro nenion entreprenas por diskrevigi la bastionon de l'prez- k aliaj kapitalistaj monopoloj, male eĉ faras multon por ĝin ŝirmi, ni povas diri, ke ĝi ne povas venki ĝin, tiom pli multe ke iam devos esti pagataj la publikaj laboroj ne produktecaj per si mem. Kiu pagos ? Ni, la laboranta popolo.

Karakteriza ŝajnas al mi jena epizodo : En majo mi legis tri- aŭ kvarfoje pri la ekonomia plivigliĝo ĉe la Frankfurta tramo ; la administracio denove ekfunkciigis tri liniojn, laŭ mia memoro n-ojn 13, 17 k 21, k reokupis 100 tramistojn. Ĉar mi tiam ne havis okazon observi la ekonomian vivon propr-okule, mi longe cerbumadis ĉu la homoj nun veturas pli multe ol antaŭe malgraŭ senlaboreco, ne malaltigitaj prezoj ktp ? Fine mi konkludis, ke temas pri provo artifice stimuli la ekonomion k labor-merkaton, kiu certe ne povas havi daŭron sen vera plifortigo de l'aĉetpovo. Ĉu mi miskonkludis ? Hazarde mi nun aŭdis de konatuloj, ke la tri linioj ne plu funkcias k la 100 tramistoj estas maldungitaj. Sed pri tio la gazetoj enhavas nenion.

Statistike k artifice forigita senlaboreco, kreskantaj prezoj k reduktitaj salajroj, ĉiam forte premas tiu ŝraŭbo de l'mizero same kiel la ŝraŭbo de l'politika k spirita subpremo. Ĉu tiele iam — ne tre baldaŭ — vekigis la homoj k hardiĝos ilia volo al ago ?

*Argus.*

## Ajnŝtajn (Einstein) ŝanĝas sian principon

La kontraŭmilitisto Alf. Nahon el Bruselo skribis antaŭ nelonge al Ajnŝtajn, kiu ofte esprimis sin favore al militserva rifuzo, rilate la manĝostrikon de la militservo-rifuzantoj De (Day) k Kampion el Bruselo. Li ricevis jenan respondon (kiun presigis la « Homara Patrio » de l'18. aŭg. 1933)

« Sekve de longa foresto k troa laboro mi ne pli frue ol nun povis legi vian leteron. Vi multe miros pri tio, kion mi estas dironta al vi Pasis nur malmulte da tempo, de kiam oni povis esperi sukcese kontraŭstari la militismon en Eŭropo per individua militservo-rifuzo. Sed nuntempe ni staras antaŭ tute aliaj cirkonstancoj.

« Troviĝas en Centra Eŭropo ŝtato (Germanio), kiu malkaŝe k per ĉiaj rimedoj preparas la militon. La latinidaj landoj, precipe Belgio k Francio, troviĝas pro tiu situacio en tre granda danĝero k nur dependas de sia propra kontraŭstaro-povo. Speciale rilate Belgion estas klare, ke tiu eta lando ne povas malatenti sian kontraŭstaro-povon, kiun ĝi tiel urĝe bezonas por gardi sian ekziston.

« Imagu al vi Belgion, okupitan de la nuna Germanio. Tio certe estus pli terura ol en 1914, malgraŭ ke jam tiutempe estis sufiĉe terure. Tial mi diras al vi malkaŝe, ke mi, se mi estus belgo, en la nunaj cirkonstancoj ne rifuzus soldatiĝi, sed konsciencie akceptus la militservon kun sento kunhelpi al la savo de la Eŭropa civilizo.

« Tio ne signifas rezignon je mia antaŭa vidpunkto. Mi deziregas, ke la tempo revenu, en kiu individua militserva rifuzo denove fariĝos celtrafa batalrimedo por homa progreso.

« Mi petas vin konigi ĉi tiun leteron al viaj samideanoj, kun kiuj vi interrilatas k aparte al la du amikoj, kiuj troviĝas en la malliberejo.

« Kun afablaj salutoj via A. Ajnŝtajn (Einstein). »

En tre malfacila momento Ajnŝtajn do elektas la militismon k metas sin flanke de la franc-belgaj militistoj k imperiistoj kontraŭ viroj, kiaj De k Kampion, kiuj — eble inspiritaj de li — kun vivdanĝero batalas kontraŭ la militismo. Ĝis antaŭ nelonge fervora simpatianto por militserva rifuzo, li nun opinias povi savi la Eŭropan civilizon per brulbomboj, venengasoj k bakterioj, tio signifas per rimedoj, kiuj ĝuste pereigas ĉi tiun civilizon.

Li volas kontraŭstari la germanan militismon per franca. Laŭ la fatala ekzemplo de 1914 ! La germana militismo tiutempe estis venkata sur la bataalkampo, la franca per tio plifortigis k nun reaperas la germana militismo en pli teruregaj formoj ol iam antaŭe, pro tio ke ĝi ne estas venkata de la kontraŭmilitismo de la germana popolo, sed de la franca militismo, kiu de eksterlime subpremas ĝin. Tiu subpremo estis unu el la plej gravaj demagogaj argumentoj de Hitler k la venko de lia faŝismo estus sen la pac-kontrakto de Versajo preskaŭ ne imagebla.

Precipe en ĉi tiu tempo plena de militdanĝeroj, ni estas devigataj pli forte ol iam ajn persisti en nia batalo kontraŭ la milito. Kian valoron havas pacismo, ĝis... la milito estas eksplodonta ?

La ŝanĝiĝo de Ajnŝtajn estas granda venko de la germana naciismo, kiu ne preterlasos uzi la sintenon de Ajnŝtajn kiel argumenton por sia starpunkto, ke la pacismo estas direktata nur kontraŭ la germana militismo.

La sinteno de Ajnŝtajn estas granda malhelpo al la batalo por la paco k kontraŭ la militismo.

*Laŭ IAK-gazetarservo trad. Bas Wels.*

*Pri la sama temo ni ricevis ampleksan tradukon (« Publika letero al Profesoro A. Ajnŝtajn ») de K-doĵ T. k V. Vesels. Ni ne publikigas ĝin pro spacomanko k ankaŭ pro tio, ke la ideo esprimita en ĝi identas kun tiu en la supra komento. Red.*

## NOTINDAĴOJ.

*Viktoro Merik (Méric) mortis.*

La 10-an de oktobro mortis la revolucia pacisto k konsekvenca kontraŭmilitisto V. Merik. Li naskiĝis en Marsejlo en 1876. Liaj avo k patro estis neŝancelemaj respublikanoj. Li mem, konatiĝinte kun la vivo en la kazerno, forlasis ĉi-tiun kiel kontraŭmilitisto por sia tuta vivo. Veninte Parizon, li frekventis la liberecanajn mediojn k komencis verki por avangardaj revuoj. Li fondis « La Homoj de l'Tago » k redaktis lerte tiun trafan pamfleton kontraŭ la nuna socio. Lia forta agitado kontraŭ la militismo kostis al li multnombrajn persekutojn k kondamnojn.

Li verkis multajn romanojn, precipe : *La Krime de l'Maljunuloj*, *La tutlasta milito*, *La fusil-kamaradoj*. Liajn memorojn li rakontis en du freŝdataj libroj *Kulisoj k faktoraĵoj k Tra la politika k literatura ĝangalo*. Precipe en siaj lastaj jaroj li dediĉis sin ekskluzive al la pacisma propagando k la batalo kontraŭ la milito. Kiel unu el la unuaj li denunciis la gasmilitan danĝeron per sensaciaj enketoj, kiujn li kunigis en libro.

Li fondis la Internacian Ligon de l'Pacobatalantoj k la semajnan journalon *La Homara Patrio*, en kiu lasta ofte aperas favoraj notoj pri esperanto k SAT.

*Proceso pro « steriligo » en Aŭstrio.*

Petro Ramus, konata anarko-sindikatista gvidanto, k 20 liaj K-doĵ estis malkondamnataj ĉe la fino de monstra proceso, daŭrinta kvar semajnojn (en julio). Ili estis akuzitaj praktiki la operacion de « kastrado » en siaj rondoj k propagandadi por ĝi. Fakte temis pri la *vazektomio*, operacio, kiu steriligas la homon, plene konservante lian seksan povon ; ĝi havas nenion komunan kun la kastrado, nek kun ia seksa stumpigo. P. Ramus propagandis por la *vazektomio* en grandaj kunvenoj k per broŝuro k altiris al si tiel la malamon de l'naciistoj k regantoj. Ankaŭ dum la proceso li defendis arde la *vazektomion* por la malriĉulo, kiu laŭ lia konvinko estas « mirindaĵo por la homaro ». La ekzameno de l'95 steriligitaj pruvis, ke neniu estis stumpigita aŭ domaĝita. Profesoro Šmerc (Graz), ĥirurgo k propagandisto de la *vazektomio*, proponis al ĉiu redoni la generan povon dank'al negrava operacio. Neniu volis konsenti al tio ; ĉiuj deziris resti steriligitaj.

*Provokisto aŭ naiva heroo?*

Okaze de la proceso kontraŭ la « ekbruligintoj de l' regna parlamento » en Lajpeigo, agitas en Holando, lia naskolando, komitato por la defendo de *fan der Lubbe*, la ĉefa akuzito. Ĉi tiu komitato argumentas kontraŭ la vidpunkto de la gazetoj de la II-a k III-a Internacioj, laŭ kiuj *fan der Lube* estas naciŝocialista provokisto. Same en Francio la anarkiema revuo « La Semisto » (Le Semeur) eldonis specialnumeron por defendi la honoron de tiu homo, kiu laŭ la vidpunkto de siaj amikoj estas sincera proleta batalanto.

## Por nia medito.

*Kio estas vero? La vero estas realaĵo, kiun oni esprimas per vortoj — k pro tio, ke oni vorte esprimas ĝin, oni donas al ĝi ian relativan karakteron, k sekve necertan. Sendube, ĉiuj realaĵoj estas realaj, sed ĉiuj veroj ne estas egale veraj, ĉar ilia formuliĝo difektas ilin.*

*Rilate sciencajn aferojn, la vero samigas kun la realaĵo; sed por sciencoj malpli precizaj ol la kemio k la fiziko la vero fariĝas necerta k en medicino, ekzemple, ne ekzistas absoluta vero. La faktoj est*

*la teorioj kiujn oni deduktas el tiuj faktoj, estas pridubindaj. Teorio estas nur hipotezo; la klarigoj k la teorioj forpasas; nur la faktoj restas.*

*Oni devas esti tiom mallime kuraĝa en hipotezo, kiom rigora en eksperimento; unu sola eksperimento neniam sufiĉas.*

*La ekonomiaj veroj verŝajne ekzistas, sed tuj kiam oni volas ilin precize difini, ili formalaperas. La historia vero povas esti nur la absolute objektiva priskribo de la faktoj, tial ke la prijuĝo k interpretado de la motivoj, kiuj instigis la regintojn k popolojn, dependas de la kapablo de la historiistoj. La vero en arto, ĝi estas la psikologia verŝajno.*

Karlo Riŝe (Riche).  
 Membro de la franca Adakemio de la sciencoj, Nobelpremiulo (1913), aŭtoro de multaj verkoj, esperantano.  
 Kompiltradukis Herezulo.

## Opinio de burĝo

Kiam mezepoka metiisto estis fininta sian verkon: belan tablon, luksan veston, ornamitajn botojn, li povis kun fiero alparoli siajn kunulojn, por ke ili admiru lian manlaboron. Tiu metiisto kompreneble konservis dum sia tuta vivodaŭro zorgeme la « ĉefverkon », kiun li prezentis al la sammetia juĝantaro por akiri « majstrecon ».

Tiu kutimo daŭris dum jarcentoj post la mezepoko. En kelkaj specialaj produktfakoj, kie la maŝinoj ne povis utili, ĝi postvivis ĝis nuntempe. Mi memoras bone, en mia junaĝo, la fieron de mia patro, kiam li povis montri al siaj amikoj sian « ĉefverkon », lignan Kalvarion kun home reprezentitaj Fido, Espero k Amo delikate inkrustitaj.

Ĉe niaj nuntempaj laboristoj, kio postvivas el tiu honora sento, kiun iliaj prauloj enŝovis en sia ĉiutaga laboro? Nenio, aŭ preskaŭ nenio!

Jen proprasperto: En granda holanda veturilfarejo, kie unu peco tre malfacile ellaborebla estis akurate k trafé pretigita, la mastro dezirante sin montri dankeme « bonulo », arigis siajn laboristojn (preskaŭ unu centon) antaŭ ol iri al la biervendejo, kie ilin li devis regali k al ili parolis pri Honoro en laboro. Dum la parolado li aludis pri la ĝojo, kiun, laŭ lia propra penso, la laboristoj sentis, kiam ili finis la belegan Industriian Palacon en Amsterdamo, unu el la famaĵoj de la urbego.

Neniu aŭskultinto moviĝis. Sed post la eliro de la mastro, parolante inter si, sidante ĉirkaŭ la tabloj, ili akordiĝis por certigi, ke ilia sento estas nek fiero,

nek ĝoja, sed bedaŭra pri la fino de la laboro. Ili estis ŝajne pensantaj « Ke la Palaco disfalu, por ke ni ankoraŭ havu laboron! »

Estas neutile sin mem trompi la nuna laboristo malofte portas intereson al sia tasko. La maŝinismo k la nuna produkta organizado mortigis tiun senton, ne nur ĉe la gelaboristoj, sed ankaŭ ĉe geoficistoj, gekontoristoj ktp.

Nuntempe regas perforte la financaj potencoj k kelkaj fibonfaruloj opinias, ke oni povus nur permone korekti la malbonejn de la ekonomia produktado. « Ni donu al laboristo kromsalajron, se li bone laboras, se li ŝparas zorgeme la krudmaterialon; ni promesu al li krompagon el la profito de la komercaferoj... ktp. »

Tiuj rimedoj povus inciti al pli granda produktado, sed oni ne povus tiele aĉeti la laborhonoron. Bedaŭrinde por la reĝoj de la Dolaro aŭ de la Franko tiu vera amo al laboro ne estas dependa de la mono.

Se oni deziras kuraci tiun maisanon, t.e. la malforteton de la laboristo por sia tasko, la malamon al la laborotaĵo (eĉ al la plej vivnecesa), oni devas difini la ĝisfundajn kaŭzojn de la nuntempa laborista sento. Oni devas klarigi senpartie, kial la pratempaj laboristoj atentegis, amegis pasie sian laboron k kial la nunaj ne agas same.

La mezepokaj manlaboristoj utiligis siajn proprajn ilojn, k se ili estis tiom malriĉaj, ke ili ne povis aĉeti krudmaterialon (lignon, marmoron, kupron aŭ drapon), la klientoj ilin provizis, sed la finita laboro havis vere personan karakteron. La laboristo sentis sin do rekte interesata por labori bele k bone. Li estis fiero pri bela verkaĵo, fortika komercaĵo.

Jam en la 17a k 18a jarcentoj en tiuj industriaj laborejoj, kiujn Adamo Smit (Smith) priskribis tiel bone kiel precize k kie « ĉiu laboristo estis farinta la dekok-onon de unu pinglo », la komercaĵoj ne havis tiun propran brilecon, kiun havis la varoj de la malnovaj tempoj. La laboristo jam ne plu havis je sia dispono siajn proprajn ilojn. Ili estis havaĵo de la mastroj k submastroj.

Tiu disiĝo inter la laboristo k liaj produktiloj estas pli grava en la plimulto el la nunaj metiejoj k industriaj laborejoj, de kiam invadis ilin en ĉiuj civilizitaj landoj la maŝinismo. Nuntempe la laboristo havas intereson en sia profesio nur por akiri ĉiam pli altajn salajrojn. En la plej oftaj kazoj li nur faras simplajn manipulojn ĉiam regule ripetatajn dum horo aŭ dum tuta tago. Tiela laboro estas unutona k pli teda ol agrabla.

Kio necesas por revivigi la intereson de la laboristo je sia laboro? Kompreneble la reveno al la malnovaj labormanieroj estas nebla en iu ajn el niaj industrioj: fera, ŝtala, karba; papera, vitra, kaŭĉuka, gasa, elektra... ktp, nek en gravaj transport-organizaĵoj fervoja, ŝipa, aŭtomobila, aerfluga... ktp. Ĉie la fabrikejoj, manufakturoj, vendejetoj anstataŭis la malgrandajn metiejojn aŭ butikojn.

Sed, se la persona rekta intereso pri la ĉiutaga produktado ne estas efektivebla rilate preskaŭ ĉiujn nunajn laboristojn, tamen oni povas plifirmigi la kolektivon intereson. Por tion atingi estas necese arigi la laboristojn kun iliaj iloj. Estas necese, ke la laboristo iam povu paroli pri sia fabriko, sia manufakturo, ĉar li devus partopreni la organizadon de la produktado.

Tiu, kiu nun posedas la necesan monon por konstruigi fabrikon, aĉeti la krudmaterialon, la maŝinojn, la ilojn, pagi salajrojn ktp... decidus nur propravole pri la organizado. Se la afero estas grava, la aro el akcihavantoj elektas la direktoraron. La laboristoj



de la fabriko estas nulaĵo en la afero. En la nuna socivivo laborforto estas nur komercaĵo, k kiam la direktoro opinias, ke per funkciigo de nova maŝino li povas ŝpari salajrajn elspezojn, li propravole maldungas kelkajn laboristojn.

En tiuj kondiĉoj tute prava estas la sinteno de la laboristoj havantaj nenian intereson pri sia ĉiutaga tasko. Tamen, la manlaboristoj, la oficistoj, la teknikistoj estus tiel kapablaj kiel la akciovantoj por elekti la direktoraron, dungi kompetentulojn. En la praktika vivo de la fabriko la salajrularo estus pli bone kvalifikita por decidi pri aĉeto de perfektigita maŝino, alpreno de novaj labormanieroj, ktp.

Kiam oni deziras munti maŝinon, oni petas la scion k la helpon de kompetentaj meĥanikistoj, inĝenieroj, teknikistoj ktp. Kia malgajno por la produktado, kiam tiuj fortoj k povoj ne estas utiligataj en la direkto de la gravaj industriaj k komercaj aferoj! Nun ili estas ŝatataj samkiel ordinaraĵoj!

La kapitalistoj, kiuj traktas teknikistojn k laboristojn same kiel komercaĵojn, ne kalkulas tiun psikologian faktoron la laborforto estas varo, kiu *pensas*, kiu havas proprajn sentojn. Ĝia malkontento estas signo pri la ebla plibonigado de la produktado, kondiĉe ke la laboristo ne plu estu ordinara varo, sed estu ĝoja en la taglaboro k fiera pri la plenumita tasko, ĉar li estas kreanto de riĉo.

*Christ. Cornelissen (La Psikologio k la Vivo.)  
Trad. Malnovulo (11 812).*

## Diskutejo.

### « GVIDISTOJ »

K-do 13606 estas kontraŭ la publika kritikado. Nu, bone, sed tiom pli ni devas kritiki efektivajn erarojn en niaj propraj organoj, kunvenoj, ktp. Cetere, la publiko tamen sciigos pri kritikindaĵoj, per la malamika gazetaro; k eble estas pli bone, ke nia propra kritiko atingas la publikon, ĉar celo de nia kritiko estas purigo, renovigo de la socialismo, k la kritiko de la faŝistaj gvidantoj nur deturnas la amasojn de iliaj propraj interesoj. Ĉi tiun diferencon K-do 13606 ne kapablas vidi. Ŝajnas, ke por li la tute paralizitaj partioj estis sufiĉe sanaj k seneraraj.

Mi ne komprenas, kial K-do 13606 uzas la vorton « kalumnio » responde al mia skribaĵo; k li tute ne *pruvas*, ke la du personoj, kontraŭ kiuj li skribas, kalumniis. Cetere li ankaŭ ne refutas, kion mi skribis (vidu n-on 7), sed alportas novan serion da argumentoj. Respondante al li, mi riskas senfinan polemikon, ĉar tiam li povos « respondi » per tria serio el same facile refuteblaj argumentoj; k, se oni ne estas tro elektema, oni povas tiel defendi la plej nepravigeblan aferon per miloj da « argumentoj ». Sed tia polemiko nenion valoras por tiu, kiu efektive k nure celas la veron.

« Grava vero estas, ke nur tiu, kiu laboras, povas fari erarojn ». Sed ankaŭ al ĉiuj konata vero. Ŝajnas do, ke K-do 13606 per ĝi volas diri aŭ sugesti ion alian nome, ke la kritikantoj *neniam* laboras. Tiam nerektan atakmanieron mi ne ŝatas, ĉar estas ĉiam dube, ĉu oni devas sin defendi tie aŭ ne. Ĝi estas maskita kalumnio.

Ĉu nia K-do ne konscias, ke ĉiun progreson antaŭiras libera, senlima kritiko? Ankaŭ lia partio dankas sian estiĝon k kreskadon al kritikemo. Do, se iu *nur* kritikus, li jam farus gravan, pioniran laboron. La malprogreso, la faŝismo, nur sukcesas tiel longe, kiel la homoj senpripense sekvas la grandbuŝulojn, la promesantojn.

Tio, kion mi supre skribis pri maskita kalumnio, ankaŭ koncernas la komparon kun la Hitler-bando: mi ĝuste skribas por fari la homojn kritikemaj, k kiam mi sukcesas, tiam nek mi, nek iu alia povos ekspluati ilin, kiel faras Hitler k diversaj aliaj gvidistoj-stultigantoj. Nur tiu povas paroli pri « konkurenca celo », kiu rigardas la socialisman movadon kiel komercistan entreprenon, k la homojn kiel komercaĵojn (senkritikan).

Aspektus malpli demagoge, se K-do 13606 ne tiel konfuze uzadus la vorton « memkritiko », k se li ne ripete klopodus identigi la kritikon de K-do De Wit k mi kun la flagoj k kalumnioj de la faŝistoj. Tia estas precize la batalmaniero de la bonzoj. Ĉu vi, K-do 13606, nun komprenas, kial ni defendas nin kontraŭ ili? Imagu, ke vi mem havus propran opinion k estus pro tio regule fiatakata de homoj, kiujn vi mem vivtenas per « eĉ ne triono » el 24000 guldenoj. (Ordinara laboristo en nederlandaj urboj perlaboras meze 1600 guldenojn).

Kial la anarkistoj sin detenis de la balotoj k de parlamenta laboro? Por trovi respondon, vi devas pristudi la anarkismon (ne en « La Popolo »). Ĉi tie mi nur povas mencii, ke *post gajnita revolucio*, de

post konkero de la ŝtatpotenco, la socialdemokratoj en Germanio havis 14 jarojn da parlamenta laboro.... Kiu post la okazintaĵoj en Germ., Aŭstrio k.a. landoj ankoraŭ kredas je la parlamento,... La monregantoj konservas ĝin, tiel longe, kiel ĝi apogas la kapitalismon, sed post konstato, ke la parlamento ne povas savi la subiĝantan kapitalismon, ili donas al ĝi piedbaton, por ke ĝi tute malaperu. Cetere la anarkistoj vidas ne principan, eble nur grandan diferencon en tio, ĉu la kato aŭ la katino ilin mordas. Ili volas nenium mastron (ekspluatanton), ne severan, sed ankaŭ ne malpli severan. En Nederlando la socialdemokrata gazetaro plie fie, pli kalumnie kontraŭbatalas la anarkismon ol ĉiuj burĝaj k faŝistaj gazetoj kune. Ĝi nur ne havas la potencon, ĉi tie ankaŭ fizike mortigi la anarkistojn; k ĉi lastaj kompreneble neniam helpas ĝin akiri tiun potencon. Nun K-do 13606 eble, imite al la soc. dem. « La Popolo », konkludas « Do la anarkistoj preferas Hitler ol Marks », sed tia konkludo kompreneble estos falsa. Ĉar, se ili preferus unu, estus Marks, ĉar li estas mortinta. Sed, kiel mi jam diris, la anarkistoj kontraŭas ĉian subpremon fare de unu homo al alia.

« tiuj tendencoj, kiuj laŭ sia aserto precize scias pri la plej taŭgaj batalmanieroj, taktikoj ktp. » estas la partio de K-do 13606 k la aliaj marksistaj partioj, kiuj ĝismorte kontraŭbatalas sin reciproke, nur pro taktikaj kaŭzoj. Ĉiu havas la *veran* Marks.

Kion la K-do skribas pri perforto k konscienco, mi ne povas rilatigi kun la tomo. Ĉu li eble celas, ke la marksistoj malpravas, ĉar ili ne povas akiri k manteni la ŝtatpotencon sen organizita perforto (la armeo)?

la germana laboristaro (ĉiuj tendencoj), ne trafis la bonajn rimedojn por atingi nian celon ». Nun K-do 13606 subite forgesas, ke ĉiuj tendencoj ne formis unu tuton. Do povas ankaŭ esti, ke unu el la tendencoj tamen laŭiris la bonan vojon k ke tiu ĉi estis la plej malforta (laŭ nombro) tendenco, kiu estis regule kalumniata de la aliaj pli fortaj tendencoj.

Kiu decidas kiu partio estas la plej grava? Ĉu la plimulto? La teorio, ke oni devas aliĝi la plej multmembran organizon por ion atingi, estas ĝusta, sed oni ne devas esti elektema, rilate al *kio* estos atingata. La plej granda k potenca (ankaŭ laborista) organizo estas la katolika eklezio; ĝi havas la « amasojn » k ĝi *atingas* i.a. ke ĉiuj anoj estas kontentaj k neribelemaj. Sed ju pli alte oni fiksis siajn idealojn, des malpli da homoj povas unuiĝi kun vi. Do, kiu aspiras al multaj facile atingeblaj ŝajnrezultoj, aliĝos la grandan organizon, sed aspirante mondon sen mastroj k sklavoj (la socialismon), oni devas ankoraŭ fari pioniran laboron, mokate de la amasoj en la eklezioj k partioj, k konstante persekutate de la interesatoj en la kapitalismo. Lastnomo verŝajne mem neniam spertos la finrezulton de siaj klopodoj, sed tamen li ne povas ne labori, pelate de ia interna devosento.

Parolante pri la displitiĝo en la laborista movado, mi volas demandi, ĉu K-do 13606 kredas povi iam kunigi ĉiujn laboristojn, aŭ almenaŭ la plejmulton, en unu partion? Mi estas certa, ke tiel longe kiel restos partioj, tiel longe ripetiĝos la displitiĝo en ĉiam pli da partioj. K ĉiam la gvidistoj ekscitos la anojn kontraŭ la aliaj partioj. Ĉar plej grava celo de la partioj k gvidistoj estas, konservi k pligrandigi la membraron, per ĉiaj rimedoj, do ankaŭ koste de la reputacio de la konkurencaj partioj. K-do 13606 diras proksimume la samon, kie li skribas: « La taktiko de alitendencaj klasbatalantoj ofte direktas sin al klopodoj por rompi la disciplinon ĉe alitendenca laborista instanco. Fako daŭre konstatabla. Laŭ mi ĝi ankaŭ estas fakto, kiu kunhelpas, eble nekonscie, la faŝismon. » Mi tute subskribas tion, k tial mi estas kontraŭ la « dividi-k-regi-politiko » de la eklezioj k partioj.

« Sed la konscia laboristaro restis k portas la eblon rekonstrui... se *nur* ĝi lernis el la okazintaĵoj.

*Konstruanto.*

*Per ĉi tiu respondo, kiu estas skribita ankaŭ kun la konsento de K-do de Wit (13 611), unu el la partoprenintoj en la diskuto (vidu la n-on 7), ni finas la debaton pri ĉi tiu temo, kiu daŭris jam tra pluraj n-roj de la revuo. Ĉiuj havis ja okazon prezenti k defendi sian vidpunkton pri la demando, k ni esperas, ke ioman spiritan utilon havis tiu ĉi debato k ke ne postrestos sento de amaro ĉe la diskutintoj, malgraŭ ke la opinioj estas malsamaj... ĝis ia grado. — Red.*

La Komunista Manifesto estas nediskuteble unu el la plej gravaj doktrinaj verkoj de l'socialismo.

Por ĝin pli bone kompreni, havigu al vi

### Komentoj al la Komunista Manifesto

(kompilis k tradukis el la angla T. Veder)

Tiu broŝuro ĵus aperis dank' al la financa helpo de Usonaj esp. marksanoj

56 paĝoj.

Prezo: 3.60 fr. fr.

SAT, 23, rue Boyer, Paris 20<sup>e</sup>



# LITERATURO.

## JOHANO ALÁZATOS MILITMORTIS

Adalberto Baço (Bacso).

Kun korpo laca pro milsepcnt-kilometra vojaĝo mi trenis min al la renkontiĝo de la terura funebro, al la kadavro de mia frato. La antaŭlonge viditaj mebloj, la rigidaj atestantoj de kelkaj miaj ĝojoj, malvarme rigardis min. Melankolie k senanime en la flave-griza kandelbrilo, kvazaŭ senmovaj gardostarantoj ili glatiĝis al la nigraj tapetoj k el mia koro ekŝprucis akra doloro. Plorante mi klinis min al la patrinaj ŝultroj kurbiĝintaj pro mil suferoj. La scio, daŭranta de tagoj, nur nun realiĝis, antaŭ la ĉerbo en kiu kuŝis mia akra voĉa, brilokula kara frato en du pecoj. Kun okuloj vualaj pro larmoj mi rigardis liajn fermitajn okulojn, lian rideton sur la lipoj, lian karbonigran hararon. Li estis malvarma k senmova. Sur lia soldatjako blanke k melankolie kuŝis bukedo da konvaloj. Sveninte pro la doloro k tutlaciĝinte pro la tritaga vojaĝo, tremetante mi ekmordis miajn lipojn, por reteni la singultan ploron antaŭ mia ploreganta patrino. Mi sentis, ke ni estas piedpremitaj, ke ribelo, blasfemo, ploro k senesperigo utilas neniom. La sorto terure k malnoble pikis nian vivon, k la tempesto ankoraŭ daŭras k neniu scias, kiam ĝi ĉesos. Inter la nigraj drapiroj, en la malklara brilo de la kandeloj, mia kadukiĝinta patrino, rigardante la mortintan filon, kun milda plendo recitas la pasinton

— Jen... tia ni reportis lin... Li foriris kun floroj, muziko... Kiam duan fojon li ricevis vundon, li diris al mi : se ankoraŭfoje oni sendos min al la militkampoj, mi ne plu revenos viva... Li pravis... Sed kial ĝuste li?... Ĉe Gorlice, Lemberg li havis nenion malbonan... Ĝuste nun, nun li devis pereii... Ĉu la multa penado estis vana? Ĉu vane li lernis, laboris dum noktoj, por pergajni la lernokotizon? Ĉu vane li estis bela, forta k saĝa? Ĉu tiel malsaĝa k senkompata estas la sorto? Dufoje li resaniĝis el gravega malsano k nun li estas mortfaligita.


Mi kapablis trovi nenian konsolan vorton. Mi rememoris niajn infantempajn vagadojn, la sunradian herbejon, la sinbanon en la rivereto.

Post la enterigo ni trarigardis liajn malnovajn objektojn. En soldatkesto ni trovis liajn karajn memoraĵojn metitajn en bela ordo. Kelkaj knabin-fotoj, aro da leteroj, premitaj floroj, koloraj rubandoj, broditaj tuketoj. Interalie mi trovis grizkovrilan, malnoyan notlibron.

Kun sopira sento mi foliumis ĝin, rememorante la feliĉojn de malnovaj revidoj. Jes, mi konis la notlibron...

Kun femurpafo li hejmenvenis el la Lembergaj bataloj. En ekscita humoro pro la travivitaj teruraĵoj li ĉirkaŭlamis la ĉambron. Kolere k ĉagrene li klarigis

— Romanojn eblus verki pri tio, kion mi notis en ĉi tiu libreto... Teruro, sufero, agoni-stertoro, siblantaj grenadoj, komandvortoj, poste ŝtormo. Ĉu vi jam trinkis ransalivan akvon? Ĉu vi jam fastis? Ankaŭ cigaredon ni ne havis. Oni povis freneziĝi pro tio... Kaj la homoj mistifikis unu la alian... Fi... Ĝiskubute oni estis sangaj... Oni ĉasas unu la alian de mateno ĝis vespero... Jen, rigardu miajn notojn...



Ĉiujn 2 minutojn —  
9 mortigitoj — —  
Ĉiujn 2 minutojn — 9 mortigitoj!

Li transdonis al mi la notlibron. Pro liaj doloraj, k ekscitaj vortoj necertece mi turnadis la foliojn de la notlibro. Mi rigardis la unuan paĝon.

— Ĝi estas la nomaro de miaj kamaradoj... li diris k klarigis al mi.

Mi legis la simplajn nomojn. Ĉiu havis alnoton. Militkaptito, invalidiĝis, forkuris, bele kantis, muzika cigano, lia tibiosto trapafita, bona kuiristo, prirabisto al kadavroj, granda korespondanto. Poste mi rigardis la nomojn enskribitajn laŭalfabete. Kvankam neniam mi konis lin, tamen tiel mi sentis, ke li ankaŭ estas mia frato. Entute nur estis : *Johano Alázatos militmortis*.

Sed en mia koro trafulmis vorto. Kial?

Mia frato sidiĝis al mi k komencis paroli kun okuloj rigardantaj foren :

— Jes... Johano Alázatos militmortis. Li estis kapolaboristo ie ĉirkaŭ Szikszó... Trankvila, kara, bona homo. Neniam li estis kolera. Li parolis milde; alkoholaĵon li ne ŝatis. Sed li povis ĉion akiri. Li faris plej multe da ŝercoj... Kvazaŭ li estus infano... Sed li havis terurajn ŝercojn... Multfoje li grimpis sur la postenlokon k kun dismetitaj brakoj promenis en la malamika kuglopluvego... Ni devis detaŭzi lin... Ni tre amis lin, do kelkfoje ni batetis lin pro liaj facilniamaj ŝercoj... Li ridis k diris « Ne povas celi tiu aĉa idaro, eĉ se ĝis vespero ili ekzercas... » Aliffoje ĉifonojn, balaaĵojn li ĵetis al la malamikaro... Tio estis lia amuzo... Ĉiuj tre amis Alázatos'on... Foje li ricevis libertempon. Kiam li revenis, li tute sangiĝis. Li iĝis silenta, neparolema... Ni ne povis kompreni la kaŭzon. La malnovajn ŝercojn li forlasis, malofte kantetis, nur melankolie silentis... Ĝis kiam ankoraŭ daŭros ĉi tiu aĉa milito? — li demandis... Ankoraŭ dek jarojn, frato Alázatos — mi respondis... Ĝis tiam ni ĉiuj pereos... — li diris k malĝojis plu...

Mia frato, rigardante al la helo venanta tra la fenestro, kvazaŭ li vidus la malproksiman vizion, daŭrigis malgaje

— Ni havis akran batalon. La germanaj kanonoj muĝis mortkoncerton abomene k terure. Kriado, veado, siblado de grenadoj ŝiris niajn nervojn. Ĉe vesperiĝo, kvazaŭ ĉasataj bestoj, ni serĉis unu la alian.

— Johano Alázatos kuŝis sur la batallinio... Sur lia blanka vizaĝo fluis sango... Li ricevis kapopafon... Sed tio ja estas tre simpla afero... Li estis kapolaboristo ĉirkaŭ Szikszó... Ĉiutaga afero...

Interese, la ceteron mi forgesis. En la funebro, en la terura frata doloro nur pri tio mi memoras klare. Kvazaŭ mia mortinta frato starus apud mi k rakontus la simplan historion pri Johano Alázatos...

En la alia ĉambro ploras mia patrino, klinante sin sur malnovan foton de mia frato. Mi rigardas la paĝojn de la notlibro k kun tima koro, konsternita kompreno mi rimarkas, ke jen, sub la nomo de Johano Alázatos, sen alnoto troviĝas la kara nomo de mia mortinta frato...

Subite preskaŭ mi forgesis la hieraŭan funebro-parolon, la Bethovenan funebromarŝon, la tombejon de la militherooj, la solenan pafadon, kvankam de tagoj ŝiras mian koron la ĉagreno. Kaj denove kla-

riĝis la realo : mia akra voĉo k brilokula frato ne vivas plu. Miaj doloraj okuloj banis sin en larmoj k en amara duonsveno, ne pro ordo, sed ĉar en tiu minuto mi vivis en turmento de freneziga doloro, en la linion sekvantan la nomon de Johano Alázatos, apud la nomon de mia frato kun tremanta mano mi alskribis ankaŭ militmortis.

*El la hungara tradukis: Ladislao Spierer.*

## BALADO

*N. Bartelmes.*

*Ŝipe! senmasta,  
Ni drivas sur ocean',  
Espero lasta  
Biskvila pun'.  
La gorĝo sekiĝas  
Pro senta amar',  
Paroloj malriĉas  
Pro pensa malklar'  
Kien perdis nin  
Malluma sort'.  
Ĉie ja dentojn  
Grincigas la Mort'*

— *Ŝipestro! krias  
Freneze l'anar'.  
Ŝipestro! Ŝipestro!  
Okula par',  
Sin boras profunden,  
Ŝtala rigard',  
Okuloj sen timo,  
Krateroj sen ard'.*

— *Ni drivas abismen,  
Pereos sen glor'  
Ŝipestro, ŝipestro,  
Direktu nin for!  
Gigantaj ondoj ŝaŭmas transborden,  
Magna nadleto obstinas norden...*

*Sarkasme ridas la kapitan'.  
— Panik' ? Malespero ?  
Gvidilon en man'  
Sonigas komandojn li;  
Vibras l'aer'  
Ondegojn, ŝipanojn  
En tromba kirl'  
Sorĉtene estras  
Volo el fer'.*

*Kolombo k Vasko, Lindbergo k Berd<sup>1</sup>,  
Riskemaj venkantoj en ŝtorm' k dezert',  
Penetrantaj sferojn,  
Realigantaj himerojn,  
Forrompantaj barierojn.*

*Kaj vi, obstinaj ŝipestroj de l'penso,  
Kaj de l'vivo socia maldorma konscienco!  
Instigu k veku, instruojn etendu,  
Direktu, ordonu, komandojn elsendu,  
Kaj kiel per tranĉa glavo vi fendu  
Timemon, hezilon k malhonestemon,  
Por mondo pli bona disĵetu la semon!  
Postrestu malklero, mizer' k malfido,  
Antaŭen k supren sub sperta gvido!*

## Akuzanto.

*Dan Andersson.*

« Ili translokas la limŝtonojn,  
rabiton gregon ili kondukas al paŝtejo.  
La azenon de orfo ili forrabas  
k la bovinon de la vidvino ili prenas kiel garantiaĵon ».

*Libro de Job.*

Sten la Senhejmulo estis lia nomo k ili ne sciis, kiu estis lia patro. Lia patrino estis malriĉa virino el la ĉirkaŭaĵo de Blivik. Oni diras, ke ŝi estis bela k povis kanti melodiojn, k ke Sten estis la produkto el trompamo de juna ĉasisto kontraŭ ŝi, kio povas esti vera aŭ mensogo, ĉar homoj rakontas tion.

Kiam mi renkontis lin la unuan fojon, li estis drinkinta kvar tagnoktojn, suferis pro postebrio ĉi-momente k portis malsekan mantukon volvititan ĉirkaŭ la kapo. Lia dusemajna barbastoplaro estis plena de tero k fulgo k la nazo estis disgratita. Laŭ kutimo li estis partopreninta interbatadon k sin retirinta al sia kabano en la soleco por metidi, kiel li diris, kial li ekzistas, ĉar li estis granda filozofo. Tiam li sidis antaŭ la fajr-ardaĵo k trinkis malvarman kafon pro manko de brando k regalis al mi flartabakon kun mieno, kvazaŭ li kompatus la plimulton el la homaro.

La alian fojon, kiam mi vidis lin, li estis helpisto ĉe kartografo, kiu laŭ la komisiono de bienulo Grot kartumis la farmetojn k arbaron ĉirkaŭ Finmarken. Li estis malebria tiam, la volvaĵo ĉirkaŭ la kapo estis for k la vizaĝo pura k razita.

Kiam mi preterpasis, la kartografo estis for ĉe tagmanĝo. Sten kuŝis en la ombro de giganta saliko, kun bierbotelo k buterpano.

— Ĝi estas nur duonbiero, li diris kun malkontenta gesto kontraŭ la botelo. Pro diablo, eĉ biero ne estas ricevebla tie ĉi.

— Kiel prosperas tio, desegni kartojn ?

— Ja, estas diabla kurado, kompreneble. Kaj tiu ĉi kampomezuristo estas nur senspertulo ankoraŭ, studento kun knabinaj manoj, senbarba k subtila, kiel estas legeble en « Vikingen ». Estas superaklasano, vi komprenas, tia, kia fariĝos ĉefo por la arbaro, forstisto aŭ io simila. Cetere li estas komplezema, sed rilate la arbaron li estas malsaĝa, kompreneble, ne helpas, se li ankaŭ scias tiel la grekan lingvon kiel astronomion. Sed la amuza afero estas, ke li opinias, ke mi estas ankoraŭ pli malsaĝa. La unuan tagon li demandis min, ĉu la homoj, la Finmarkanojn kompreneble li celis, povas sorĉi ankoraŭ hodiaŭ. « Jes », mi diris, « sufiĉas, ke ili ebriiĝu k ili povas sangskarifi k aŭguri k sorĉi k povas aperigi la diablon k ĉion ajn ».

— Kaj kiam ni venis al Pajsodigo, kie Muelej-Anders, kiel vi scias, distranĉis sian kolon antaŭ dekdu jaroj, mi diris « Tie ĉi malriĉa senhelpulo distranĉis sian kolon dum malserena vespero, ĉar li havis neniom por manĝi, k tio estis la kulpo de la sinjoroj ». — « Kiel do », li diris, « neniu povas kulpi, se iu entre-

prenas memmortigi sin ». — « Vere », mi diris, « estas tamen strange, se viro laboras tiom, kiom li povas k estas ia helpisto por ĉio, kio estas riparenda k farenda ĉe produktejo, k li ricevas tian mizeran salajron, ke li iĝas freneza pro malsato ; ĉu do la labordonanto ne kulpas ? » — Tiam la kartografo respondis nenion.

— Kaj poste mi diris jenon « Mi naskiĝis tie ĉi en la arbaroj, k mia patrino k ŝia patrino estas naskitaj tie ĉi, k mia patrino havis farmeton hereditan de sia patrino, kiu ricevis ĝin de sia patro. Ĝi kuŝis en ŝtatarbaro iam antaŭe k estis kulturata de malriĉuloj, k la produktejo de Bihitan procesis for de ŝi la farmeton k forpelis ŝin kun ĉifonaj infanoj por iri almozpeti, k ke ŝi tamen ne distranĉis sian kolon, certe ne estis la kulpo de la sinjoroj, sed ŝia merito, k certe dependis de tio, ke la virino konsistis el bona materialo. Kaj ĉe Bihitan, tie estis kelkaj ercfandistoj, kiuj estis tiel malsategaj, ke ili anĝi argilon, k unu provis manĝi sunsekan sterkon. Kaj ĉiuj farmetistoj perdis siajn posedaĵojn, de Niten ĝis la fino de la Blivika paroĥlimo, ĉion procesis for de ili la sinjoroj! Ĉe Varjhitan ili malsatis, ĉe Ulriksberj ili malsatis k la sinjoroj havis vipojn el plektita bovhaŭto sur la kontormuroj, por la okazo se iu grumblus, kompreneble. La ŝtatarbaroj fariĝis disponarbaroj<sup>1</sup>, kiam la fersinjoroj venis, k la farmetistoj estis sklavoj en la produktejoj, k nun, kiam ĉesis produkti la ferfarejoj, Grot malgraŭ tio posedas la arbaron ». — Ĉion ĉi mi diris, k la kartografo diris nenion.

Sed mi povus tamen toleri tiun ĉi forstaspiranton sufiĉe bone, se li nur ne tiel superece estus rigardanta min. Ĉar mi estas por tiel diri libera homo, malgraŭ ke mi nutras min per la manĝaĵo de la fersinjoroj k karbigas iliajn ŝtiparojn. Li opinias kompreneble, ke mi estas ia pli malbona besto ol li, ĉar li havas ekzamenon k mi ne. Sed mi scias multe, kion li ne povas lerni dum du homvivoj. Viro ne estas viro, se li ne scias svingi hakilon k konstrui kabanon k kuŝi ĉe fajro, kiun li mem ekbruligis, k tion eĉ meze en vintro. Li kapablu pasigi la vivon sen servistinoj k virinhelpo. Sed kion povas tia ulo ?

— Kaj li aŭdis, ke ili nomas min la filozofo, k ĝi estas moknomo, k tiel li delogas min priparoli, kion mi legis, k kiam mi prezentas la dorson, li ridas. Kiam mi rakontis, ke mi legis Libkneht k Bernŝtajn k Kaŭcki k havas scion en sociologio k io simila, li diris, ke tio estas afektado. Tion li diris. « Jes, pro diablo, nature tio estas afektado », mi diris, « ĉar mastro Grot konstruigis forĝejon ĉe Blivika, kiu havas ses metrojn en kvadrato k tie oni laboris kelkajn semajnojn dum la jaro, nur tial ke li ankoraŭ havu la ŝtatarbaron, kiu estas disponita al ferfarejoj k forĝejoj ». — Tiam li demandis, kiel tio rilatas al Libkneht k, Bernŝtajn, sed mi respondis, ke tio neniel rilatas, ĉar ili estis veraj sociologoj k neniam gardistoj de ŝtatarbaro. Kaj la kartografo, li diris nenion.

— Nun mi scias, kion tiu ĉi kartografo opinias pri « afektado », k tio povas esti ĝusta k mi komencis pensi, ke eble estas bezonataj kelkaj generacioj ĝis — ĝis la plej mizera malriĉo naskos sian plej bonan infanon al la mondo — Multaj malsatos k mortos ĝis tiam k multaj iĝos afektuloj k sin okupos pri tio, kio estas legebla en la libroj, k ili estos insultataj k hontigataj k malsatigataj k ili tamen daŭrigos — ĉar ili sentas neceson de scio k bezonon de ago — sed fine ĉio, kion ili ĉiuj pensis k ekkonis k suferis en centoj da jaroj, naskos ian mirindulon, kiu unue pelos flanken sian propran malriĉon k poste kunhelpos la aliajn k li devenos rekte el la vicjoj de la malriĉuloj k havos nek student-ekzamenon nek forstist-uniformon nek virinmanojn, k li estos tiom forta, ke la kanajlaro de ĉiuj fersinjoroj k ties pastroj k helpistoj malaperos. Fariĝos revolucio k li estos generalo k ĉefribelo, k poste ni kartumos tie ĉi laŭ alia maniero.

La tusado ĉesis, k kiam li estis venkinta la atakon, mi diris

— Sten, vi, kiu ĉiukaze estas multscia homo, ĉu vi ne opinias, — kiam tiu ĉi viro estos veninta, k kiam la revolucio estos farita, ke la novaj sinjoroj disputos pri la regpotenco, k la sama mizero kiel antaŭe reviviĝos el la ruinoj de sklaveco k sinjorlukso ?

Ĉiukaze estas ĉagrene. Tie ĉi vivis niaj prapatroj k foruziĝis ĝis la ostoj k iliajn farmetojn k kampetojn formanĝis la fersinjoroj, k ni iras tie ĉi k helpas al la sinjoroj kartumi niajn arbarojn. Ni estis irintaj antaŭen trans sep farmetojn nun, k la plej multaj estos replantataj per arboj. Arbaro kreskos sur la kampoj nun. Kaj Grot, li veturos al Riviero k rigardos printempon ĉe Mediteraneo, k tio estas pli bona, la forstaspirantaĉoj prizorgos certe la ŝtatarbarojn. Sed trans dispremitajn, malsategajn korpojn kondukas la vojo de la fersinjoroj, malgraŭ tio ke ĝi kondukas al Mediteraneo. Sed nun venas la kartografo. Jes, jes, nun vi povas komenci k ekzameni lin pri la ŝtata justo, li aŭdu vian koncepton !

— Ne, vi, Sten, mi diris, vi sciu, ke ankaŭ la rajto al socikritiko estas la rajto de la privilegiuloj. Se mi scias pri iom pli ol ŝtiparoj k karboligno, tio estas eble : « afektado ».



La trian k lastan fojon, kiam mi aŭskultis lin paroli, estis en trunkokabano sur la montodorso de Karna Draina. Li kuŝis sur sternaĵo el abibrandaĵoj k eltusadis la pulmojn, k li estis tre pala k havis blankajn sengrasajn sinjorromanojn. Helpo ne estis trovebla, k li eĉ ne deziris ĝin ; li devas morti nun, li diris. Manĝaĵon li ricevis de hakistoj por karboligno, kun kiuj li antaŭe drinkis k interbatalis dum la salajrotagoj. La kuracisto ne sciis, ke li ekzistas.

Li mortis, dum ni staris k rigardis. Estis relative kvietita morto, sed antaŭ ol ĝi venis, li sidiĝis k faris sian lastan paroladon en tiu ĉi mondo. Inter ektusoj ĝi aŭdigis k tekstis jene :

— Nun mi scias, kion tiu ĉi kartografo opinias pri « afektado », k tio povas esti ĝusta k mi komencis pensi, ke eble estas bezonataj kelkaj generacioj ĝis — ĝis la plej mizera malriĉo naskos sian plej bonan infanon al la mondo — Multaj malsatos k mortos ĝis tiam k multaj iĝos afektuloj k sin okupos pri tio, kio estas legebla en la libroj, k ili estos insultataj k hontigataj k malsatigataj k ili tamen daŭrigos — ĉar ili sentas neceson de scio k bezonon de ago — sed fine ĉio, kion ili ĉiuj pensis k ekkonis k suferis en centoj da jaroj, naskos ian mirindulon, kiu unue pelos flanken sian propran malriĉon k poste kunhelpos la aliajn k li devenos rekte el la vicjoj de la malriĉuloj k havos nek student-ekzamenon nek forstist-uniformon nek virinmanojn, k li estos tiom forta, ke la kanajlaro de ĉiuj fersinjoroj k ties pastroj k helpistoj malaperos. Fariĝos revolucio k li estos generalo k ĉefribelo, k poste ni kartumos tie ĉi laŭ alia maniero.

La tusado ĉesis, k kiam li estis venkinta la atakon, mi diris

— Sten, vi, kiu ĉiukaze estas multscia homo, ĉu vi ne opinias, — kiam tiu ĉi viro estos veninta, k kiam la revolucio estos farita, ke la novaj sinjoroj disputos pri la regpotenco, k la sama mizero kiel antaŭe reviviĝos el la ruinoj de sklaveco k sinjorlukso ?

<sup>2</sup> Al la ferfandejoj oni disponigis la arbaron kontraŭ eta sumo. Trad.



Sten ridetis k kuŝigis sin.. Jes, ekzistas historioj pri tio, li diris trankvile, k tiuj, kiuj estas malkleraj, ĉiam estos la sterko, en kiu aŭ per kiu kreskados la kleraj. Estas danĝere esti malklera. Sed kiam la homoj fariĝos kleraj, ili ne lasos sin subpremi tiomlonge, antaŭ ol ili ribelos. Kaj plie, ni tiam por-eterne lasis post ni la malnovan radsulkon. Naskiĝos granda ŝafo, sed malmulte da lano kompare kun tio, kion oni pensis. Tamen io restos. Vi atentu.

— Mi englutis venenon, li daŭrigis sensente k trankvile, ĉar mi ne volas ĝeni vin k tio estas same bona kiel dum iu tempo atendi la finiĝon. Vi transportu mian korpon per trunkoglitilo malsupren de Matna Draina ĝis la vilaĝo, kie la vilaĝestraro prizorgu mian kadavron.

Sten mortis kelkan tempon post tiu ĉi parolado, mortis kun tri profundaj ekspiroj. Li forlasis la mondon kiel vera viro. Estis inter sunsubiro k lunleviĝo, en la unua malvarma horo de la nokto, k ni ordis lian korpon k kovris ĝin per sakoj pro la ratoj k ni iris al la vilaĝo por havigi viron k ĉevalon.

Kaj dum tagiĝo, kiam la suno leviĝis klare k la tuta montvalo brilegis kiel vitro en la severa malvarmo, tiam Sten faris sian lastan vojaĝon malsupren de Matna Draina, ĉirkaŭvolvite per sakotolo, kiu frostligiĝis al la rigida korpo. Lia problemo pri la surtera vivo estis solvita k kiel okazos rilate la niajn, ni ĉiam povos ekscii pli poste.

Ĉion ĉi k iom pli mi rakontis al la kartografo, kiam li estis supre lastfoje. Ankaŭ mi diris al li, ke mi aprobas la paroladon de Sten antaŭ la pordo al la morto. Sed la kartografo, li diris nenion.

*Laŭ la sveda lingvo tradukis Nigrulo.*

---

ADLEL-librojn ne aboni  
estas peko  
kontraŭ via biblioteko !

---

## LA SONGOVENDISTO

*Herminia Zur Mühlen.*

La vespera stelo estis mia vojmontrilo, dum mi migris sur la longa strato de l'Dormo. Kiel grandegaj nigraj montoj buliĝis nuboj ĉe la horizonto. Malsupre, malproksime iom post iom perdiĝis la bruego de la granda urbo k la lumigiloj tie estingiĝis, unu post la alia. Mi alvenis ĉe libera placo; tie altiĝis granda konstruo kun vasta portiko. Per oraj literoj en la ŝtonon lumis la vortoj: « Songovendejo ». Antaŭ la halo staris altstatura maljunulo. Lia mantelo montris ĉiujn kolorojn de la ĉielarko; lia griza barbo preskaŭ atingis la teron. Amikece li invitis min alproksimiĝi, k mi sekvis lin en la halon. Sennombraj longaj tabloj staris tie. Per silkpapero zorgeme envolvitaj, ĉiuspecaj objektoj troviĝis sur la tabloj. Ĉe la malantaŭa muro mi rimarkis malgrandan ferpordon.

« Kian songon vi deziras? » demandis min la maljunulo; bonkore li ridetis, rigardante mian fadenmontran vestaĵon.

« Mi ne komprenas vin », mi respondis. « Migrante mi alvenis ĉi tien; mi tute ne sciis, ke ĉi tie troviĝas tia grandega halo.

« Tio estas la halo de la songoj », klarigis la maljunulo. « Staru nur iomete flanke, baldaŭ venos miaj klientoj »

Mi obeis. Jam post kelkaj minutoj mi vidis sur la strato aron da infanoj alvenantaj. Ili ĉiuj estis ĉifon-

vestitaj k malgrasaj, iliaj malĝojaj okuloj petegante fiksas la rigardon sur la maljunulon.

Li kondukis ilin al la unua granda tablo. Amikece parolante li malvolvis el la silkpapero bongustajn manĝaĵojn k ĉiaspecajn apetitigajn frandaĵojn k metis ĉion en la etenditajn infanmanojn. De alia tablo li alportis varmigajn, molajn vestaĵojn, de tria belajn ludilojn. La vizaĝoj de l'infanoj heliĝis pro feliĉo; gaje la etuloj kunfrapis la manojn k forkuris feliĉege.

« Bonkora homo vi estas », mi alparolis la maljunulon, « vi donacas al la malriĉaj infanoj, kion ila koro deziras ».

La bonkora maljuna vizaĝo malmoliĝis k mallumiĝis « Mi ne donacas tion al ili. Ĉiu songo estas pagata per malsataj horoj k tagoj, per frostoj k malvarmego, per neplenumitaj deziroj. *Tiuj ĉi* klientoj ricevas nenion senpage. Sed staru ree flanke. La sekvantaj jam proksimiĝas ». Viroj k virinoj alvenis sur la strato, kun lacaj paŝoj, kun malesperaj mienoj. La songovendisto demandis afable pri ili deziro k prenis la deziriton de la tabloj firmaj okupoj, bona salajro, komforta varma ĉambro, sano por malsana infano. Por gejunuloj la maljunulo iafoje aldonis ankoraŭ ridetante songon volvititan en vaton, sur kies kovraĵo estis skribite per grandaj, ruĝaj literoj: « Atentu! Amfeliĉo! Rompebla! Ne falegigi! ».

Kiam la viroj k virinoj estis foririntaj, la songovendisto malgaje skuis la blankan kapon k murmuris por si: « Tropagita! Tropagita! Per kiom da suferoj k malhavo tiuj ĉi songoj devas esti pagataj! ».

Sur la strato de l'Dormo nun eksonis subite aŭtobruado k klaksonoj<sup>1</sup>. Longa aro da nobelaj gesinjoroj alveturis, elveturiliĝis antaŭ la halo k ordonis al la veturigisto atendi. La maljuna songovendisto kolere rigardis la novajn venintojn, li ne salutis ilin, nek demandis pri iliaj deziroj, nek ofertis al ili varojn. Sed ili ne atentis pri li, rapidegis en la halon, kuris al la plej malantaŭaj tabloj, disvolvis la pakaĵojn k kaptis per avidaj manoj ilian enhavon. Mi vidis, kiel ili prenis al si juvelojn k belegajn kostumojn, brilajn kastelojn, belajn ĉevalojn, jahtojn, gigantajn fabrikojn, oron k banknotojn. Tiam ili ree enaŭtomobiligiĝis k forrapidegis.

« Per kio pagis ĉi tiuj homoj? » mi demandis la songovendiston.

« Tiuj homoj ne pagas mem », li respondis kolerege. « La larmoj, la malsato de l'mizeraj infanoj, la mize-rego de l'geviroj pagas tiujn ĉi songojn. » « Sed tio ja estas maljusta! » mi kriis indigne.

Tiam la songovendisto rigardis kun stranga rideto al la malgranda ferpordo, sed li parolis nenion. Post momento li rigardis grandan, laŭte tiktakantan<sup>2</sup> horloĝon k diris: « Estas malfrue. Mi volas fermi la butikon ». Sed mi kriis « Ne, atendu! Mi vidas ankoraŭ homojn sur la strato ».

Kaj vere: alproksimiĝis ankoraŭ kelkaj geviroj. Ili kredeble trapasis longan, penigan vojon, ĉar iliaj piedoj sangis k iliaj vestoj estis disŝiritaj de dornoj. La maljuna songovendisto renkonte kuris al ili k akompanis ilin en la halon. Sed ili preterpasis senatente ĉiujn tablojn k ekhaltis nur antaŭ la fera pordo.

La maljuna songovendisto stariĝis antaŭ la pordo k kriis per tondranta voĉo « Ĉu vi do scias, kiom vi devas pagi por tiu ĉi songo? »

« Ni scias », respondis la geviroj.

« Persekuton k suferojn, malhonoron, karceron k morton », avertis la maljuna songovendisto k etendis rifuzgeste la brakojn.

<sup>1</sup> La sonoj eligataj per la aŭtomobilista avertilo.

<sup>2</sup> Tiktako = la meĥanika seka sonosekvo de funkcia horloĝo.

Tiam parolis unu el la virinoj « Estu bonvenaj persekuto k suferoj, malhonoro, karcerò k morto pro tiu ĉi sonĝo ».

Kaj kiel eĥo murmuris la aliaj « Bonvenaj! Bonvenaj! »

« Ĉu vi ankaŭ scias », diris laŭte la maljuna sonĝovendisto, « ke tiu ĉi sonĝo estas alia ol ĉiuj ceteraj sonĝoj? Vi ne povos formeti ĝin la matenon; ĝi ĉirkaŭos vin tage k nokte. Kaj kiu elektas tiun ĉi sonĝon, devas rezigni pri ĉiuj aliaj sonĝoj ».

« Ni scias », respondis la geviroj.

« Do, eniru! » — Kaj la maljuna sonĝovendisto malfermis vaste la ferpordon. Lumego k brilego penetris en la halon, tiel ke mi blindigite devis fermi la okulojn. Kiam la geviroj revenis k trapaŝis la halon, sur ilia vizaĝo kuŝis mirinda helo, k el iliaj okuloj radiis supertera ĝojo. Kaj ankaŭ la vizaĝo de l'maljuna sonĝovendisto lumis feliĉege.

~~Kiam la geviroj estis foririntaj, mi demandis:~~  
« Kia estas tiu sonĝo kiu elektis ti ĉi homoj k ĝi per tiel alta prezo? »

La maljuna sonĝovendisto respondis: « Tio estas sonĝo, kiu ne estas sonĝo, sed estonto k vero la sonĝo pri nova k justa mondo ».

Kiel per sorĉa povo subite malaperis la halego, k kun ĝi la sonĝovendisto. Mi staris sola sur la strato de l'Dormo. Sed profunde en la subo kuŝis la dormanta, sonĝanta mondo.

*Tradukis el la germana 17 418.*

## Lurd (Lourdes)

Jam estas mezo de l'somero. Malgraŭ la premega aero eĉ matene regas vigla aktiveco. En la ĉefstratoj, kie viciĝas vendejo apud vendejo, oni estas laboremaj, purigante sanktulbildojn k -statuojn. Aliajn sanktajn objektojn oni elmetas antaŭ la vendejoj por vendi sur la strato.

Tiu bildo jam klarigas, ke ĉi tie regas la eklezio. Je la deka matene komenciĝas vigla vivo, la stratoj pleniĝas per centoj, eĉ per miloj da personoj. Frapante estas, ke oni vidas multajn malsanulojn aŭ invalidojn. Ĉiuj vizaĝoj montras ion saman, ion formondecan. El Holando, Belgio, Anglio k el Germanio oni venas ĉi tien, en la kredo... retrovi saniĝon tie ĉi, en la sankta urbo Lurd. Lingvojn el multaj nacioj oni estas aŭdanta. La homriverigo ne estas finiĝonta. Oni portas enmane flagojn, sanktajn tabulojn, statuojn aŭ ankaŭ incensujojn. Monotona kantado, kelknacilingve, permesas al mi nur kompreni la komunajn vortojn « Ho, Maria, helpu nun »... k tiel estas facile konstati, ke tiu ĉi homriverigo estas pilgrimado.

Antaŭe paŝas la holandaj geviroj k infanoj, kiuj faris la longegan vojaĝon tra tuta Francio ĝis tie proksime al la hispana limo. Sen halto oni marŝas de la malgranda stacidomo (kiu ne plu kapablas akcepti la novevenontajn ekstravagonarojn) al la katedralo. Jam el la malproksimo oni ekvidas ĝin, en direkto al piedo de la Pirenea montaro, ĉe la ŝtonego starante, elrigardante k vokante en la landon.

En la ĉefparto de la katedralo oficas, kompreneble parolante franclingve, la episkopo de Lurd, ĉirkaŭite de aliaj altranguloj k de multkolora klerikaro. En aliaj katedralpartoj oni legas la meson en diversaj naciaj lingvoj, tiel en angla, germana k nederlanda. Ĉio estas en profunda pio k malgraŭ la diversaj naciaj regas tie ĉi granda unueco.

La plej granda aktiveco regas tamen antaŭ k flanke de la katedralo, sur la vojo al la sankta kriptoj. Tie devis aperi la patrino Maria antaŭ longa tempo al knabino el Lurd... tie estas la sankta fonto... per la trinkado de kies akvo oni devas resaniĝi. « Ho, Maria, ho, Maria! » ĉiam ree k ree oni aŭdas eksoni tiujn vortojn, kiujn nur ĝenas la en ŝajna ekstazo parolantaj pastroj. Tie estas la haltejo por la malsanul-veturiloj. Estas kelkaj centoj. Psikaj k fizikaj malsanuloj, portate, veturigite aŭ ĉe lambastono lamante, trovas mistikan plezuron. Enmane la rozarion, rigardante al la krucifikso, oni submetiĝas al eklezia ceremonio. Oni volas saniĝi nome de la patrino Maria. Mirakloj devas okazi tie ĉi... tiel estas skribanta la katolika mondgazetaro. Sed... se oni tie ĉi ne resaniĝas... tiam oni devos trovi favoron en la transa mondo... pro la pilgrimado, k tial denove oni suferas pli trankvile la malsanon aŭ kriplecon nunan.

~~Antaŭ la katedralo oni renkontas multajn maljunajn ĉiujn strangvizaĝajn, kiuj vendas ankaŭ sanktajn kandelojn al pilgrimantoj. Tio estas la plej bona negoco en la urbo, ĉar ĉiu pilgrimanto aĉetas almenaŭ unu, ofte multajn kandelojn, por ke li poste demetu ilin ĉe la sankta kriptoj. La kriptoj estas proprasence la ĉefa feliĉejo de la pilgrimantoj.~~

Ju pli ili proksimiĝas al la kriptoj, des pli forta fariĝas la voko de la malsanuloj, idiotoj, malesperuloj aŭ aliaj nenormaluloj « Ho, Maria, helpu nin »... En la multe lumigita kriptoj kun ĝiaj brulantaj kandeloj k granda Maria-statuo estas premanta silento. Oni sentas, ke ĉi tie estas la plejsankta loko... tie ĉi ankaŭ troviĝas la fonto, ĉi-loke devis okazi mirakloj... k la pilgrimantoj kredas trovi tie ĉi la plenumon de siaj deziroj. Jes, tie ĉi estas la fonto; tamen per ĝi okazas malpli da mirakloj, ol ĉerpas realan profiton la katolika eklezio....

La aĉetitajn kandelojn oni nun devas demeti, en la trankvila atendo, ke nun certe efektiviĝos la helpo de Maria. Super la heligita altaro, en la kriptoj k ankaŭ ambaŭflanke de ĝi pendas sennombraj bastonoj k bandaĝoj. Saniĝintaj invalidoj lasis tiujn objektojn tie ĉi por manifesti, ke ili resaniĝis!?

De la kriptoj la amaso iras al sankta akvokondukilo. Ĉi tiu ankaŭ servu al sanigo. La personoj trinkas avide el la pokalo, Speciale preparitaj, ankaŭ sanktigita pokaloj estas aĉetebaj kontraŭ kelkaj frankoj. Kunportitajn aŭ ankaŭ tie aĉetitajn akvujojn oni nun plenigas per kvin aŭ ofte eĉ dek litroj da akvo. Al la hejme restintaj malsanuloj devos servi kiel medikamento tiu ĉi akvo. Oni trenas ĝin ofte tra miloj da kilometroj hejmen el Lurd — tiun ĉi akvon, kiu estas tute simila al ĉiu alia akvo... malseka k freŝa. En Lurd oni diras, ke eĉ nekreduloj per tiu akvo konvertiĝis.

Kredante, ke sano venos, la pilgrimantoj lasas tie en Lurd multe da mono. Oni elspezas milionojn por kandeloj, pokaloj, akvujoj, sanktulbildoj aŭ aliaj sanktaj objektoj. Malgraŭ la tutmonda mizero k la ekonomia krizo prosperas tie la negoco. Ĉefan enspezon havas la eklezio. Precipe ĝi ricevas monon en Lurd per kolektoj. Kaj aliflanke kreskas la trunko de ĝia anaro per la konvertitoj.

Tiel la negocoscia eklezio prezentas en Lurd grandan potencon. Tio ŝajnas hodiaŭ, en la epoko de l'tekniko k scienco, preskaŭ nekomprenbla por ĉiu racia homo. Milionojn, kiujn pli bone oni povus uzi por la utilo de l'homaro, englutas la eklezio k eĉ multaj proletoj, laŭ mia observo, ĵetas monon en la faŭkon de l'nesatigebla moloĥo. Multaj kripluloj oferas siajn lastajn pesetojn, por post disreviĝo pri la mirakla kuracado en Lurd ekpreni la almoz-

bastonon. La fabelhistorioj pri Lurd estas por la eklezio lerta helpo en ĝia propagando. Per tiu ĉi idiota, mezepoka agado ĝi volas influu denove la homaron, k tiu malinda ludo multrilate havas sukceson.

Ĉiu racia homo kunhelpu por detruu la nesciaron k la mistikan senton k ekzili la miraklofabelojn, kiel tiun pri Lurd, en la fabelolibrojn.

*Snejder (18 057).*

**Biblioteko tuta  
Por prezo lilliputa = ADLEL.**

## Verkistoj k Verkoj

**Francisko Siladji (Szilagyi):**  
**« Trans la fabeloceano »**

*Ni volas memoriĝi, ke pri la sama verko aperis jam iom konciza recenzo de N.B. en « La Nova Epoko » n-o 99, p. 60. — Red.*

Fabeloj. Tiu ĉi vorto trudas en la imagon la infanon k memorigas pri niaj infantempaj, pasintaj revoj k vanaj esperoj. Tamen la verkojn de Andersen k.a. grandaj fabelistoj ankaŭ la plenaĝuloj tralegas kun intereso al la kaŝitaj instruoj, belo k ĉarmo, kiuj ĝenerale regas ilin.

La esperantistoj varbiĝas el plenaĝuloj, kiuj estas post la revoj, k la hodiaŭo trudas al ili zorgojn pri la morgaŭo k pensojn pri la problemoj de la vivo. Precipe ni — laboristoj — ne havas eĉ minuton por la drakoj, reĝidoj k cindrulinoj, ĉar ni verkas la grandan historian fabelon de la klasbatalo, krizoj, senlaboreco k malsato. Ni tamen ne forjetas la belan k artan produkton de plumoj, eĉ tiam ne, se tiuj ne plene respondas al niaj idealoj k postuloj. Ni nur konstatas, ke hodiaŭ estas bezonataj tiaj fabelistoj, kiuj fabelas pri la nunaj problemoj. Ni ĝojus, se naskiĝus la esp-ista fabelisto, kiu en siaj fabeloj vipus la maljustaĵojn k vestus per fabelaj manteloj la filojn de la mondskala subpremo. La herooj de la fabeloj parolu kuraĝe kontraŭ la diboĉuloj, kiuj rajdas rikane sur la kolo de la jungitaj milionoj.

Francisko Siladji ekpaŝis sur vojo proksimiĝanta al tiuj ĉi postuloj. Nur domaĝe, ke li prefere miksis la teknikon en siajn fabelojn, ne sociajn problemojn. La recenzistoj — la laboristaj trafe-maltrafe, la burĝaj sence aŭ trolaŭde — jam parolis pri ĉi tiu libro. Sed laŭ mi la pensoj de Siladji, dissemataj en la fabeloj, meritas pli larĝan okupiĝon. La laboristaj gazetoj ĝenerale konsentas pri tio, ke la novelo « Vintro » estas la plej bona. Kontraŭ tio, mi asertas, ke preskaŭ ĉiuj rakontoj k fabeloj de Siladji estas bonaj, spritaj k meditigaj. Estas kelkaj, kiuj eĉ laŭ laboristaj vidpunktoj meritas menciojn.

Leginte la libron, mi sentis, ke Siladji havas pensojn, profundajn pensojn. Li vidas la mizeron, konas ties kaŭzojn; vidas la sensentan, vandalan subpremon, sentas la suferojn de la milionamasoj, sed ne kuraĝas rekte, senkaŝe vortigi siajn sentojn k pensojn. Ŝajnas, kvazaŭ iu monstro retenus la plumon de la verkisto. Li esprimas sin time, nebule.

Por konigi la arton k pensmanieron de Siladji, mi skizas aparte nur lian « Fabelo pri la malgaja reĝidino ». Tiu ĉi fabelo pruvas pleje miajn suprajn asertojn k en tiu ĉi fabelo pentras S. arte, en bela alegorio la premitan situacion k suferojn de la laboranta klaso sub la jugo de la reganta. Tiu ĉi fabelo per siaj kaŝitaj vero k ĉarmo proksimiĝas la aŭtoron al la larĝa tavolo de la laboranta klaso.

En tiu ĉi fabelo la gereĝa paro reprezentas la kapitalistojn k la malgaja reĝidino la suferantan laboristaron.

« Ankaŭ la reĝo preferis la monon ol la homojn k sian solan filinon, k ili ordonis al la malfeliĉa reĝidino, ke ŝi lavu ĉiutage nudpiede la ŝtuparon de la reĝa palaco. » (p. 68).

La reĝa paro devigis la reĝidinon lavi la ŝtuparon. La reĝidino malsaniĝis. Ŝia duonpatrino kredigas al la reĝo, ke ŝi estas ruza k mallaborema, sed la reĝidino malgajiĝas k tusadas. Post longa tusado ŝi elsputas grandan diamanton. La gereĝoj ekĝojas pro la diamanto k zorgas, ke la reĝidino ne resaniĝu.

Jen la situacio de la suferanta klaso, kiu estas devigata liveri la profiton per siaj sango k sano al la kapitalistoj. Sed somere la reĝidino komencis plifortiĝi. Pasis la tusado k ŝi ne plu elsputis diamantojn por la monavidaj gereĝoj. Tiam la reĝa paro alvenigis kuraciston por remalsanigi ŝin. La kuracisto konsilis konstrui domon kun ventoliloj k aliaj maŝinoj, kiuj eligis egan malvarmon. « La senfina oferemo de la gereĝoj » finacis tiun ĉi konstruadon k la reĝidino devis restadi en tiu ĉi domo ok horojn potage. Ŝi denove malsaniĝis k elsputis diamantojn.

Tre bone pentras Siladji, ke la sana k forta laboristaro ne estas ekspluetebla kiel la malfortiĝinta. La kapitalistoj zorgas pri la detranĉo de la fortoj. La reĝidino suferas elsputadis la diamantojn, sed fine ŝin minacis la morto. La gereĝoj ektimis pro nericevo plua de diamantoj k denove venigis la kuraciston. La reĝidino estis resanigata, sed kiam ŝi estis sufiĉe forta, oni denove malsanigis ŝin perforte por ricevi diamantojn.

Malproksime en alia lando vivis juna bonkora reĝido. Li ŭdis pri la suferoj de la malgaja reĝidino k li ekiris por savi ŝin.

« Li estis fajrokula, forta k bela... Li ekiris... Li vagis multe... Tre multe... Liaj okuloj paliĝis... Sed li restis forta... (p. 72).

En la juna reĝido ni retrovas la ideon pri la socialismo, kiu ekiris por savi la suferantan klason. Jes. La kapitalistoj penas ĝin paligi, sed ĝi restas forta. Kun la tusanta reĝidino (suferante klaso) Siladji identigas sin jene

« Mi tre petas la indulgon de la afabla Leganto, nun mi ne povas daŭrigi la fabelon, ĉar mi malvarmumis. Mi tusas, mi ege tusas... »

Tre bele, tre arte! Mi povas diri, eĉ tro arte por ne esti preskaŭ aŭ tute nekomprenebla por la ĝenerala tavolo de la esp-istaro. Ti ĉi tamen ne malbonigas la valoron de la fabelo. Mankas devizoj, tradraŝitaj citoj, k la leganto tamen sentas la sociajn maljustojn. Vole-nevole li devas pensi pri la suferanta klaso, ki inter konvulsi tusado liveras dismantojn al la kapitalistoj.

Ĉe la fino S. diras, ke la fabelo ne estas finita, — li ne trovis la li Jes, ni ankaŭ scias, ke la finon verkoŝ la estonto.

Ĉiuj fabeloj k noveloj de S. meritas atenton, sed per la « Fabelo pri la malgaja reĝidino » li grandpaŝe proksimiĝis al la taskoj, kiujn mi destinus al la esperantista fabelisto. La nebulenco k timemo, kiu superregas la plejmulton el liaj rakontoj, estas granda malavantaĝo de verkisto, kiu cetere havas talenton, senton k pensojn, ĉar verkisto nur tiel povas atingi la supran ŝtupon de la arta kreado, se li diras rekte k klare, kion li sentas k pensas. Pentristo ne povas pentri laŭ modele uzata arbetejo pompan palmon.

*Emba.*

## Korektoj

En la artikolo pri lasta verko de *Sinkler* (Sinclair), kiu aperis en la lasta n-ro, bonv. fari jenajn korektojn, necesajn por bone kompreni la sencon (p. 115, kol. 1, linio 13) « Sed la japanoj povus vendi pli malkare ol ni (subvendi nin) ». Ne temas propradire pri dumpingo. (P. 114, kol. 2, lin. 20) legu « faktoron » anst. « fakturon ». (P. 115, kol. 1, lin. 41) « scios » (anst. scias). (P. 115, kol. 2, lin. 17) « tiuj sumoj ne portus iun procentaĵon » (anst. « al ni proc... »). Ĉe la komenco de la dua alineo en p. 115, kol. 2, mankas la citsignoj: « Mi diras.... »

La aŭtoro (E.K.L.) ne kulpas pri tiuj eraroj sencoŝanĝaj.

## SCIENCO

### Lingvistiko.

*Difinado de la vortoj abio k piceo.*

Kontrolante diversajn esp-vortarojn oni povas rimarki, ke la difinoj aŭ tradukoj nacilingven pri la vortoj *abio* k *piceo* ne interkonformas. La kaŭzo de tio estas la latinlingva deveno de tiuj du nomoj el *abies* k *picea*. Pri tiuj nomitaj botanikaj genroj okazis dum longa tempo multe da diskutado inter botanistoj. Tio rezultigis sufiĉe longan vicon da sinonimoj al la du genroj, kiuj ambaŭ i.a. siavice havis la nomojn *abies* k *picea*. Tiu multisinimeco kompreneble komplikis la nomenklaturon de tiuj genroj k klarigas la neprecizajn difinojn, kiujn donis *Zamenhof* al *abio* k *piceo*.

El la du vortoj fakte nur *abio* en la praktiko estas uzata, dum la vorto *piceo* estas preskaŭ tute nekonata vorto en esp-o malgraŭ tio, ke ĝi troviĝas en la Fundamento. *Abio* uziĝis en la senco zamenhofa — vortaristoj provis konformigi ĝin (k *piceo*) al la sciencaj botanikaj nomoj — k el tio sekvis iom da konfuzo k malklaro. Provante iom ordigi ni unue rigardu la diversajn difinojn-tradukojn.



*Oficiala difinado (Of. klasika libro k «Fundamento»):*  
«*Abio*; sapin; fir; Tanne.» (laŭ Fundamento k Of. kl. libro).

La franca vorto *sapin* havas vastan sencon, ampleksante la ses genrojn *abies* Mill., *picea* Dietrich, *keteleeria* Carr., *tsuga* Endl., *pseudotsuga* Carr., k *pinus* L. (Bois de sapin = pinligno). La germana vorto *Tanne* k la angla *fir* havas iom malpli vastan sencon, ampleksante la menciitajn genrojn krom *pinus* L.

«*Piceo*; sapin; firtree; Edeltanne.» (laŭ Fundamento).

«*Piceo*; sapin de Norvège, epicea; silver fir; Weisstanne.» (laŭ Of. kl. l).

La tradukoj en la Fundamento donas al *piceo* laŭ la franca k angla tradukoj la sencon jam donitan al *abio*, dum per la germana traduko *Edeltanne* ĝi nur devas signifi *abies* Mill. En la of. kl. libro la tradukoj ankaŭ ne interkonformas *sapin de Norvège*, ~~*epicea* estas *picea excelsa* Lk., *silver fir* k *Weisstanne*~~ estas *abies alba* Mill. Same ne interkonforma la itala k hispana tradukoj en of. kl. libro.

La vortaro de KABE difinas

«*Abio*: pinglarbo; ĝia ligno estas uzata de l'ĉarpentistoj, lignajistoj (*Abies pectinata*)».

La vortaro de VERAX ankaŭ indikas la nomon *Abies pectinata* k aldonas *sapin argenté*, *sapin de Normandie*, tio do estas *abies alba* Mill.

«*Piceo*: arbo el la grupo de l'koniferoj (*Picea*)».

VERAX indikas la nomon *Abies excelsa*, t.e. evidente *picea excelsa* Lk. (Ĝuste la multsinonimeco postulas, ke oni aldonu ĉe la latinaj nomoj la aŭtonomon. Ekz. *a. excelsa* estas sinonimo k por *a. alba* Mill k por *picea excelsa* Lk. Tamen sendube VERAX celas indiki la lastan, ĉar la menciita sinonimo estis precipe multe uzata por tiu speco).

«Plena Vortaro» difinas simple

«*Abio*: arbo konifera: *abies*».

«*Piceo*: konifera tre ofta arbo: *picea*».

Tiuj difinoj estas tute laŭ la ĝustaj latinaj nomoj, sed ili parte estas nekonformaj al la ĝenerala lingva uzado.

Fine la indikoj de WÜSTER (Enc. Vortaro esp-agermana)

«*Abio*: 1; Tanne: abioido ohne Kurztriebe mit flachen Nadeln, d.s. die Gattungen *Abies* Lk., *Keteleeria* Carr., *Tsuga* Endl. und *Pseudotsuga* Carr.

[2: bisweilen (iafoje): *piceo* 1].»

«*Piceo*: 1: Fichte, (Rot) Tanne (Gatt. der abioidoj, *Picea* Lk., *Abies* Don.; Nadeln vierkantig mit scharfer Spitze); [2: bisweilen (iafoje) *abio* 1].»

Tiuj ĉi difinoj same kiel tiuj de Pl. V. konformas al la ĝustaj latinaj genronomoj. La angulaj krampoj signifas, ke la enhavitaj sencoj estu evitataj. La sencoj nekonformaj al la sciencaj botanikaj nomoj do estas malrekomendataj. (La ankoraŭ ne aperintan, indikotan artikoleon pri *piceo* afable sciigis al mi dro-ing. E. Wüster, same kiel li ankaŭ respondis aliajn demandojn faritajn koncerne la ĉi-pitraktatan problemon).

Por montri la uzadon de la vorto *abio* eble sufiĉas prezenti la sekvantajn ekzemplojn. *Zamenhof* en la fabelo de H. C. Andersen «*Abio*»<sup>1</sup>

«En la arbaro staris beleta arbo; ĝi havis bonan lokon, la suno povis penetri al ĝi, estis sufiĉe da aero, k ĉirkaŭe kreskis multe da pli grandaj kamaradoj, *abioj* k *pinoj*» ktp. <

Christaller tradukas la faman germanan kanton «*Oh, Tannenbaum, oh Tannenbaum*» per

*Abio* vi, *abio* vi,  
kun foliar' daŭrema....

La aplikado en tiuj du ekzemploj de *abio* reprezentas la ĝeneralan uzadon. Kiun sencon havas la vorto en tiuj du ekzemploj? En la fabelo de Andersen temas pri tiu arbo, kiun oni uzas por la kristnaska festo, en Danio, la lando de la fama fabelverkisto, tio ĉefe estas *picea excelsa* Lk.<sup>2</sup>). Sed li ne pensas speciale pri tiu botanika speco, sed ĝenerale pri iu arbo el la genroj *abies* aŭ *picea* aŭ aliaj al ili tre similaj genroj. Tio ankaŭ evidentiĝas per la esprimo «ĉirkaŭe kreskis multe da pli grandaj kamaradoj, *abioj* k *pinoj*». Tio ĉi ĝuste estas la populara klasifikado de la nefakulo unuflanke la *abiojn* (*abies* Mill. k *picea* Dietr., krome *keteleeria* Carr., *tsuga* Endl., *pseudotsuga* Carr., kiuj genroj ĉiuj kvin nur estas distigataj de la fakuloj), aliflanke la *pinojn* (*pinus* distigbla per la nefakulo pro siaj longaj fasko kunigitaj pingloj). Ĝuste tiu populara klasifikado bone montras, kial oni nur uzas la vorton *abio* k preskaŭ neniam la vorton *piceo* en esp-o. Fakte en la ĝenerala lingvo oni ĝis nun nur bezonis unu solan esprimon por la nomita grupo de pinglarboj.

En la alia akzemplo «*Oh, Tannenbaum*» la apliko de *abio* estas tre klare la sama kiel tiu en la unua ekzemplo, ĝi havas la sencon de tiu supre menciita populara grupo de pinglarboj.

Ankoraŭ mi mencias modernan tradukon pri konata poemo de Henriko Heine. La originalo komenciĝas

Ein *Fichtenbaum* steht einsam  
Im Norden auf kahler Höh.

Zamenhofa traduko (Krestomatia)

En nord' unu *pino* en solo  
Dormetas sur nuda altaĵo.

k la moderna de Fr. Döring («*Esperanto*», januaro 1928)

*Abio* altleviĝas  
Sur norda mont' izola.

La germana vorto *Fichte* havas du sencojn: 1) *picea* Dietr., kiu senco estas la botanike korekta, 2) *pinus* L., kiu senco nun estas antikviĝinta, sed kiu validis tempe de Heine. La Zamenhofa *pino* do estas konforma al la tiutempa senco, dum *piceo* estus korekta laŭ la moderna, botanika senco de *Fichte*. Malgraŭ tio, ke *piceo* estus botanike korekta, Döring pravĉe preferas *abio* anstataŭ *piceo* (eble preferinde estus konservi la vorton *pino*, kiun arbon supozeble deziris prikanti la poeto). *Abio* estas konata de la leganto, dum la pli korekta *piceo*<sup>2</sup> por la granda plimulto estas senviva vorto nekonata, kiun la leganto devas serĉi en vortaro. La vortaro de Wüster malkonsilas la uzadon de *abio*. en la senco de *picea* Dietr. (Lk.). Tiun averton oni certe faras tute vane. Oni per ĝi postulas tro da botanika scio ĉe la simplulo — temas ja pri vortoj por la komuna lingvo, ne por la botanika terminaro. La praktiko el la naciaj lingvoj k el la jama uzado en esp-o montras, ke estas trafe havi vastasencan esprimon ampleksantan la supre menciitan popularan kvin-familian grupon *abio*. La kunpreno de *picea* Dietr. en la sencon de *abio* ja ne estas pli peka al la sciencaj postuloj ol tio, ke *abio* jam

<sup>1</sup> En la diversaj landoj estas uzataj diversaj specoj tiel el *abies* Mill. kiel el *picea* Dietr., verŝajne ankaŭ el aliaj similaj genroj.

<sup>2</sup> Laŭ konstato en letero de Wüster tiu vorto nun estas sufiĉe ofte uzata buŝe de germ. esp-istoj en la moderna senco de germana «*Fichte*».

<sup>1</sup> Tradukita per la germana lingvo, en kiu la danaj vortoj «*Gran*» k «*Grantræ*» (= *abio*) estas tradukitaj per «*Tanne*» k «*Tannenbaum*».

ankaŭ ampleksas aliajn genrojn krom *abies* Mill. La difekto de la tuta afero fakte ĉefe kuŝas en tio, ke la latinaj nomoj estas la fontvortoj por la esp-aj.

Per la materialo jen prezentita mi emas konkludi, ke la du vortoj devas havi la subajn difinojn, kiuj certe plej konformas al la uzado k samtempe al la postuloj de la botanika sistematiko

**ABIO** 1) arbo el la genroj *abies* Mill., *picea* Dietr. *keteleeria* Carr *tsuga* Endl. aŭ *pseudotsuga* Carr, inter kiuj genroj iuj specoj estas multe uzataj en nordaj landoj por la kristnaska festo (la vasta senco de la of. kl. libro).

2) arbo el la genro *abies* Mill. (La difino de Pl.V.; *abio* tie estas botanika termino; la difino ja fakte estas enhavita en la unua difino, nur indikita por akcenti, ke la vorto kiel botanika termino povas havi pli limigitan senco; cetere botanisto certe preferus apliki la latinajn nomojn.).

**PICEO**: arbo el la genro *picea* Dietr. (la difino de Pl.V.; laŭ ĉi tiuj difinoj oni do bone povus diri: la kristnaska *abio* uzata en Danio (*picea* ~~... Lk.~~) estas *piceo*!).

*Påulo Naergaard,  
lic. de hortikulturo*


**Aldona noto**: Traleginte la supran artikolon s-ro Wüster ankoraŭ proponas la samajn difinojn kiel en sia *Enc. Vortaro*. Tamen li konsentas forstrecki la angulajn krampojn ĉirkaŭ la signifo « 2 » de *abio*.

En tiu formo mi tute konsentas kun la difinoj de Wüster, vidante nur formalan, sed ne realan diferencon inter ili k la supre de mi proponitaj.

**ADLEL? Ĉu nova vorto?**

Ne, literatura forto.

## Sub la Sagoj de l'Kritiko



**CANKAR: SERVULRAJTO.** Prilaboris en versoj d-ro *Stefančić*. Form. 12 x 20; 68 pĝ. Prezo 2 sv. fk. Eldonis « La Suda Stelo », Slav. Brod, Jugoslavio.

Ĉi tiu eposa poemo en 6 kantoj estas vere rimarkinda k drameca. Iu bonhava kampulo mortis k tiam la here-

danto, lia juna filo, forpelas senkompate el la domo la maljunan serviston. Ĉi tiu, restinte ĉe la kampulo, lia patro, dum 40 jaroj, troviĝas nun sen hejmo k postulas sian rajton. Li sin turnas sinsekve al eksstudento, al vilaĝestro, al juĝisto, al poliestro k al pastro; ĉie li renkontas nur repuŝojn k mokojn, k fine oni lin arestas k rekondukas en lian vilaĝon. Sed ĉar li ĉi tie ne trovas ian hejmon, pro kolero li bruligas la mastrodomon.

Tia estas la temo. Koncerne la poemon mem, mi devas diri, ke kelkiuj ne ŝatas la modernan poezion, kiu ofte kripligas la gramatikon, konversas la naturan vortordon, taŭzas la senco k en tute malfaciligas la komprenon. Ĉi tiujn riproĉojn certe ne meritas nia talentava poeto *Stefančić*, kiu tamen forigas radikale la apostrofon. La formoj *vilaĝ, lum, labor — l aranĝo, l espero, l okazo, l imago — trā l, de l, ĉe l, pri l* estas sendube akceptindaj en poezio; sed jenaj: *Finis vi l servadon* (p. 22), *via l kampteraro* (22), *kurba la korpo, balbuta l lango* (23), *kaj l vivan parolon* (27), *ĉe li l justec* (33), *min k l komunumon*, k.m.a. certe ne estas Zamenhofaj kun aŭ sen apostrofo. Mi notis ankaŭ kelkajn novajn vortojn k esprimojn pli malpli rekomendindajn *saĝumi, piedi, literato, ek vin igu* (22), *smei, lispi, apelo, for vin polvu* (46), *senvortdira, iĝi veka* (55), *pardonu onin, dinamiki* (68). Sed malgraŭ ĉio, ni, modestaj prozistoj, ne estu tro severaj kontraŭ niaj poetoj; ĉi tiuj posedas ĉian ajn rajton, kondiĉe ke ili plaĉas, k *Servulrajto* certe plaĉos al multaj el ni, se ne al ĉiuj.

H. B.

**G. P. DE BRUIN GVIDILO TRA LA ESPERANTO-MOVADO.** SAT-eldono. 1933. — Form. 12 x 18,5 cm. 48 pĝ. Prezo: 4 fr. fr.

Novebakitaj esperantistoj, finintaj sian unuan kurson, jam deziras havi informojn pri la organiza vivo de la esperantistaro. Vane ili serĉas en la esp. literaturo verkon, kiu enkondukus ilin en la historio k organizaj formoj de la esp. movado. Ĉi tiu verketo de K-do De Bruin plene forigas tiun mankon, k oni devas diri, ke la aŭtoro bone sukcesis en sia tasko liveri la necesajn dokumentojn. Precipe la SAT-movado k tiu de la LEA-oj estas tre detale pritraktita. Tiu fakto estas duoble ĝojiga por laborista esperantisto. La ordo de la materialo estas same klara kiel la lingvaĵo. Ni do rekomendas varme al ĉiuj seriozaj esperantistoj ĉi tiun libreton.

N. B.

## Korespondado

**Ĉeĥoslovakio.**

K-do *Heinrich Görlitz*, a.ŝ. Krankenhaus, *Teplitz-Schönau*, serĉas gekoresp-antojn seriozajn pri socialismo k la lab. movado ĝenerale.

K-do *Josef Trekoval*, *Stary Kolin* 210, PM., kĉl. Resp. garant. (Yvert-Senf-Michel).

**Estonio.**

24-jara estona samideano dez. kor. kun Gek-doj el ĉl. pĉt. Laudezire kor. ankaŭ germane. *Viktor Kraut*, Uus savi 4-4, *Tartu*.

**Nederlando.**

K-do *F. Goudbeek*, Piet Heinstr. 35, *Zwolle*, dez. interŝ. PM., kĉl., precipe kun Ĉi io, Jap. Estonio, Latvio, Amer., Sovetio ktp (krom Germ.).

Diversaj geesp-istoj dez. kor. kun ĉiuj landoj. Resp. garantiata. Skribu al *Jac. Vonk*, *Zuiddyk* 244, *Zaandam*.

**Portugaliao.**

Lab. Esp. Soc. « Antaŭen », *Rua da Costa*, 124, 1º. D-to., *Lisbono*, deziras aranĝi kolektivajn korespondadon kun samcelaj organizoj ĉiulandaj.

Dez. kor. kun eksterl. K-doj: *Alberto Guedes Travessa*, *gadeiras*, 4 r/c, *Lisboa*.

Hej! Hej! Esperantistoj el ĉiu angulo de l'mondo! La Lab. Esp. Klubo de Nynāshamn aranĝos letervesp. la 11-an de dec. Montru al ni, ke nia lingvo vivas! Resp. garantiata. Ni volas koresp. kun ĉiu homo, blanka aŭ nigra, flava aŭ ruĝa. Skribu al K-do *Axel Rising*, *Skolgatan* 39, *Nynāshamn* (Svedio).

La klubo FORTA VOLO aranĝos letervesperon la 5-an de decembro k tiam ni atendas leterojn k PK de Gek-doj en la tuta mondo. Respondo garantiata. Adresu: K-do *E. Karlsröm*, *Strandg.*, *Klagshamn*, Svedio.

### Nekrologo

Maljuna ukrainia poeto k filozofo, esperantisto de post 1912, simpatiinto al alta ideo de Sennaciismo

### J. P. Dubjanski

en urbeto Borzna estas kruele mortigita de lokaj rabistoj. Multaj SAT-anoj sovetiaj neesprimeble ĉagreniĝas k kondolencas.

### NIA POŬTO

3 398. — Versajne aperos parto el via materialo.  
17 040. — Certe aperos.

### Radio-programo

- 10. nov. 22.07-22.30, Leningrado, 1:304 m, la sukcesoj de naciaj respublikoj en USSR (same: 14.XI.)
- 11. nov. 16.15 — 16.30, Tour Eiffel, 1.445 m, pri turismo (same: 18.XI.)
- 12. nov. 13.00-13.30, Karlskrona, 196 m, literaturo.
- 15. nov. 22.05-22.20, Wien, 517 m, k relajoj, vintrosporto en Aŭstrio.
- 19. nov. 18.30-19.30, Tallinn, 298,6 m, Tartu, parolado.

La 15-an de decembro nia grupo aranĝos letervesperon. Gek-doj. k. grupoj el ĉiuj landoj, skribu al « Liberiga Stelo » *Hygiäplein* 14 (II) *Amsterdam-Z*. Respondo garantiata.

La Komerclaborista Esp. Klubo de Stokholmo aranĝos letervesperon meze de novembro 1933. Bonvolu sendi amase leterojn, PI. k. a. aĵojn al: K-do *Allan Lindestam*, *Hagagatan* 48. *Stockholm* (Svedio)

### K-doj el tutmondo!

Bonv. sendi al nia grupo div. esp-aĵojn, prop. afiŝojn, gaz., L. Per ĉi tio ni dez. okazigi ekspoz. dum nia klubvesp. por gekursanoj k membroj. Rekomp. laŭdez. PI, L aŭ gaz. Adr.: *S. Otsen*, *Barentzstr.* 71, I, *Amsterdam (C)*, Nederl.

Le Gérant: L. GLODEAU.